

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2012

6

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №6 (212)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2012

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №6 (212).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 мая 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Li ree estas...

“Ne amu min, amu la mian!”, — diris foje Nikolao Berdjaev. Tiu formulo ideale konvenas al la personeco de Jean-Jacques Rousseau, naskiĝinta antaŭ 300 jaroj, la 28an de junio 1712 en Ĝenevo. La franca filozofa havis dumvive duoblan famon: abstraktan kaj konkretan, art-sciencan kaj individuan, kaj la du famoj ĉiam pli disiĝis ĝis lia fizika morto. Poste, ĝis nun, restis leĝe la unua, kiu estas gloro.

Rousseau, sendube, estas granda stilisto. Lia prozo portas ŝarĝon de inspiro, li elektrigas la temon, la objekton de la skribo, la procedon de la lego kaj — nature — la leganton. Estas troa la demando: ĉu oni povas atingi tiun kaj tian efikon per sole stilistaj artifektoj? Do ne, — malgraŭ oftaj akuzoj pri kontraŭdireco, diletantismo, malprofundo de lia idearo, la enhavo de la verkoj de Rousseau restas la baza parto de lia dumviva kaj postmorta sukceso.

Sed kia paradokso, homo kiu diras ke la kulturo pereigas — al la publiko kredanta la progreson, kiu asertas ke ne la penso sed la sento meritas respekton — al la publiko diiganta la racion, tiu homo iĝas spirita aŭtoritato, profeto, la plej influa persono de la intelekta horizonto de sia epoko!

Verŝajne, ni devas rigardi pli ol la ideologian surfacon, pli ol sloganojn kaj ĉefvortojn — por riveli veran enhavon de la mesaĝo de Rousseau.

“La natura rajto, kiel ajn difinita, ne povas permesi ke infano gvidu maljunulon, ke stultulo regu la saĝulon, kaj ke eto da homoj dronu en lukso dum la ego bezonas la plej necesan”. Ĉu tiun citaĵon oni konsideru racionalista, ĉu sensualista? Ĝi estas tamen racia kaj samtempe — plena de sento.

“Rezigni sian liberecon signifas rezigni sian homan valoron, sian rajton de homo, eĉ ties deojn”. Ĉu ne racia kaj samtempe senta estas tiu apologio de libereco?

“Kaj kio koncernas la riĉecon — neniuj homoj devas esti tiom riĉa por aĉeti la alian, kaj neniuj tiom povra por esti devigita sin vendi”.

La lasta citaĵo tuŝas doloran kordon de nia hodiaŭa civilizacio. Ĝi ŝirpasas tiun eternan nervon de la socia kunekzisto. Jean-Jacques Rousseau ne restas por ni kiel etapo de penso, kiel historia tipo, kiel heroo de panteono — li ree estas — soldato en la armeo de la universa justeco, en tiu armeo, kies taĉmentoj batalas nun sur la stratoj de urboj de la mondo — jen en Nov-Jorko, jen en Londono, Parizo, Ateno, Romo, Moskvo, Barcelono.

Nia postmodernisma epoko taŭgus por ilustrati la Rusoan paradokson pri la regresa efiko de scienca kaj arta progreso. Jean-Jacques Rousseau apenaŭ komprenus la diskurson de Jacques Derrida. Ne tial ke ĉi-lastaj kaŝas en si tro komplikajn scion. Sole ĉar ĝi principe rezignis la sencon.

Feliĉe por ilia memrespekto, la nunaj gigantoj spiritaj neniom divenas pri tiaj mankoj — por tio ili jam ne havas necesan nocian instrumentaron.

Alen Kris

La kovropaĝa foto estas dediĉita al datreveno. Ne al tiu de Rousseau, kiun la mondo festas ĉi-monate, sed al la 20-jariĝo de la Ibera grupo, eble la plej aktiva en la nuna Esperanta literaturo. En la 71a Hispana Esperanto-Kongreso oni festis ĉi tiun eventon, kaj Javier Guerrero fotis la Iberan kvaropon antaŭ la monumento al Miguel de Cervantes en Campo de Criptana; de maldekstre: Miguel Gutiérrez Adúriz, Miguel Fernández, Jorge Camacho, Abel Montagut. *La Ondo* aliĝas al la gratul-horo!

Albanio – lando de kontrastoj

Serĉante en mia arkivo iujn informojn mi hazarde trovis intervjuon, faritan en 2003 de loka ĵurnalistino. Ŝi demandis min, interalie, pri nerealigitaj revoj. “Viziti Albanion”, — estis la respondo. Mi naskiĝis en malgranda urbo en la Malsupra Silezio. Ĝin ekloĝis diversaj familioj, kiuj pro la ŝanĝo de la limoj post la Dua Mondmilito serĉis novajn eblecojn por vivi en paco: eĉ grekoj kaj albanoj, kaj ŝajnas al mi, ke precipe infanoj vivis tiam en harmonio partoprenante la saman bazan lernejon.

En 2012 Tomasz Chmielik tradukis al Esperanto la libron *Hunda haŭto* de la nuntempa albana verkisto Fatos Kongoli, kaj per komunaj fortoj de sponsoroj, interalie, de la alzasano Edmond Ludvig kaj de la Podlaĥia Libraro, ĝi estis eldonita en Bjalistoko. Tiu ĉi evento naskis la ideon vojaĝi al Albanio kaj renkontiĝi kun la aŭtoro. Poloj, latvino kaj svedo interkonsentis rete pri renkontiĝo en Tirano la 14an de aprilo.

En la flughaveno noktomeze atendis nin profesoro Bardhyl Selimi — loka organizanto de nia restado. La dua grupo venis de Krakovo per buseto. Nia celo estis ne nur konatiĝi kun la lando, sed ankaŭ promocii Esperanton. 50-minuta televida intervjuo pri Esperanto farita kun ni estis spektbla en la tuta Albanio. Okazis renkontiĝoj en la Akademio de Sciencoj kaj en la Ministerio pri Kulturo, Sporto kaj Junularo, kaj prelego en la Tirana Universitato por studentoj de fremdlingvoj. Jola Kieres el Nowy Sącz instruis amuze Esperanton al gestudentoj uzante la metodon de Cseh; Bardhyl tuj kaptis okazon por skribi sur la tabulo la kontaktadresojn por venontaj kursanoj.

La plej grava momento estis la renkontiĝo kun la aŭtoro de la libro. Supozante, ke ĝi temas iomete pri lia biografio, mi atendis renkontiĝon kun iu frustrita donĵuano, tamen ne... Modesta, ĉarma en interhomaj rilatoj, parolanta mallaŭte kaj ege kortuŝe, li multe impresis nin.

Okaze de la libroprezento ĉe la Akademio de Sciencoj renkontiĝis politikistoj, akademianoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, diplomatoj, esperantistoj kaj pluraj ĵurnalistoj. Mi admiris la facilecon, kun kiu Bardhyl Selimi tradukis simultane la paroladojn. Aplaudon vekis la informo, ke danke al la universala lingvo *Hunda haŭto* atingis Pollandon, Luksemburgion, Usonon, kaj

eĉ Madagaskaron. Tomasz havis okazon rakonti pri aliaj libroj de albanaj aŭtoroj tradukataj al Esperanto.

Kion devus fari Esperantistoj en via urbo por allogi reprezentantojn de sep televidstacioj, dek ĵurnalistojn el lokaj kaj landaj gazetoj, reprezentantojn de radioj? Ĉi-foje sufiĉis antaŭinformi pri renkontiĝo kun la fama verkisto, kies verko estas eldonita en lingvo rara kaj ekzotika, tamen parolata en 120 landoj. La vorto “Esperanto” estis unusola, kiun ni komprenis provante legi gazetojn en la sekva tago. Ni alportis 50 ekzemplerojn da *Hunda haŭto* en Esperanto por ricevi aŭtografajn de la aŭtoro.

Al ĉiuj eminentuloj ni enmanigis salutmesaĝon de la direktoro de la Podlaĥia Libraro en Esperanto en la formo de privata letero kaj po du libroj eldonitaj esperantlingve en Bjalistoko. Ili ĉiuj tuj provis legi!

Albanio estas por mi mirinda lando de kontrastoj. Alia lingvo, alia mental-eco. Mi supozis vidi rusan provincon, kaj ŝokis min supermodernaj domoj apud ruinigitaj dometoj. La malnova urbocentro de Tirano fakte ne ekzistas. Survoje al provinco tristigis nin skeletoj de iamaj fabrikoj, kiuj produktis uzante la rusan aŭ la ĉinan teknologiojn kaj nun estas fermitaj pro manko de mendoj. En modernaj vendejoj nur la lingvo de prezslipoj montras en kiu lando vi estas, ĉar produktoj estas vere internaciaj. Ĉu vi povas imagi mil parojn da uzitaj ŝuoj pendantaj sur la palisetaro uzata kiel ekspozicio? Eĉ tian vendejon mi vidis en Tirano. Sciante, ke en Albanio 25% de la landa produktado donas agrokulturo mi esperis viziti subĉielajn bazarojn plenajn

de nutraĵo kaj orientaj dolĉaĵoj. Bedaŭrinde, oni vendis tie nur uzitajn aŭ ĉinajn vestaĵojn.

Shaban Hasani — nia gvidanto dum turismaj ekskursoj — rakontis, ke multaj albanaj familioj havas eksterlande sian reprezentanton, kiu forveturis por mallege labori kaj sendi monon al la patrujo. Pri la terura tempo de la regado de Enver Hoxha rakontas ekspozicio en la Historia Muzeo de Tirano. Tio jam pasis, kaj albanoj denove vekiĝas sen timo. De la 7a horo matene kafejoj jam estas plenaj de viroj, kiuj trinkante ege fortan kafon pritraktas aferojn. Promenante laŭlonge de la plaĝo en Durres oni admiras modernajn ripozdomojn kaj bluajn base- nojn kun kristala akvo por malgrandaj infanoj. Apude estis videbla truo de iu konduktubaro, per kiu ripozdomo (?) elfluigas malpuraĵojn en la maron. Sur multaj tegmentoj de altaj kaj malaltaj domoj estas grandegaj ujoj por kolekti akvon, ĉar en diversaj kvartaloj de Tirano kaj en aliaj urboj ĝi estas porciumata.

En la universitato mi vidis ordeman, bone vestitan junularon, sed surstrate videblaj estis modestaj homoj: nek elegantuloj, nek mizeruloj. Plaĉis al mi, ke viroj ĉiam ŝajnas esti freŝrazitaj kaj havas kurte tonditajn harojn. Ĉiuj aspektis pacemaj kaj paciencaj: ili ridetis al ni, kiam ni provis interkompreniĝi. Mi esperas reveni Albanion post kelkaj jaroj por vidi tion, kion mi ne sukcesis vidi dum la kelktaga restado. Espereble nia alveno helpis al lokaj esperantistoj varbi por Esperanto junularon kion ni el la tuta koro deziris al niaj ĉarmaj gastigantoj adiaŭante ilin.

Elżbieta Karczewska



Tirano: La televida programo pri Esperanto.

Malferma Tago en Roterdamo

D-ro Ulrich Lins estis la ĉefa preleganto en la 36a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28an de aprilo 2012. La aranĝo allogis 85 vizitantojn kaj okazis precize 50 jarojn post la translokiĝo de la oficejo al la domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176. D-ro Lins, kiu vizitas la UEA-domon jam de pli ol kvar jardekoj, prelegis dufoje pri personoj, kiujn li renkontis dum siaj vizitoj, kaj pri movadaj eventoj, ligitaj al la CO dum tiu periodo.

La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Seán Ó Riain, parolis pri la civitana iniciato por la kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto. Flory Witdoeckt vivigis la prelegon kantante la himnon kun la vortoj de Umberto Broccatelli. Lige kun la kunsido de la Estraro de UEA ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de TEJO kaj ILEI, kiuj prezentis la agadon de siaj organizaĵoj. Pri TEJO parolis prezidanto Łukasz Żebrowski kaj estrarano Nico Huurman. La ILEI-prezidanto Stefan MacGill rakontis ne nur pri sia organizaĵo sed ankaŭ pri la Esperanto-kurso, kreita kiel kontribuo al la 125-jariĝa jubileo de Esperanto.

La programo tradicie komenciĝis per prezentado de libroservaj novaĵoj kaj finiĝis per respondado de estraranoj de UEA al la demandoj de la publiko. Pro sia kunsido post la Malferma Tago ĉeestis ses el la sep estraranoj. Komence de la lasta programero la publiko ricevis pruvon, ke la gvidado de UEA estas lingve en bonaj manoj, ĉar Katalin Kováts transdonis al prezidanto Probal Dasgupta diplomon pro lia sukceso ĉe la KER-ekzameno.

Jam pli frue estis aliaj solenaj momentoj: Katalin Kováts kaj Barbara Pietrzak gratulis kun florbukedo la Honoran Membron de UEA, Miła van der Horst-Kolińska, pro ŝia 85-jariĝo; kaj Ans Bakker, gratulante la jubileantan oficejon, transdonis koverton kun grava donaco por la ciferecigo de kolektoj de ĝia biblioteko.

Samtempe kun la prelegoj oni montris filmojn en alia ĉambro, kie funkciis ankaŭ bazaro de esperantaĵoj. Bone vizitata estis kompreneble ankaŭ la libroservo, kiu vendis librojn kaj aliajn varojn por la suma valoro de 1856,80 eŭroj.

La sekva Malferma Tago de la Centra Oficejo estos sabaton, la 24an de novembro 2012.

GK UEA



Nederlando: Nova poŝtmarko

Por omaĝi la 125an datrevenon de la apero de la *Unua Libro* de Esperanto kaj por reklami la lingvon, UEA mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL poŝtmarkon kun la jubilea emblemo desegnita de la brita esperantisto Peter Oliver. Ĝi validas por afranki unuaklasan leteron ĝis 20gr. enlande en Nederlando.

En marto la simbolo aperis sur poŝtmarko mendita de Esperanto-Asocio de Finnlando. La nova nederlanda marko estis eldonita sojle de la Malferma Tago de la Centra Oficejo, kaj ĝi estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA, en blokoj de 10 markoj. Unu bloko kostas 6 eŭrojn (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla).

La poŝtmarko pri la 125-jariĝo de Esperanto estas la kvina laŭ mendo de UEA. La antaŭaj markoj ricevis multe da publikeco en nederlandaj filatelaj revuoj, kaj la nova marko certe spertos la samon. La temoj de la unuaj du markoj, aperintaj en 2008, estis la 93a UK en Roterdamo kaj la 100a datreveno de la fondo de UEA. Ili ambaŭ estas elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblas la poŝtmarkoj pri la 150a datreveno de Zamenhof kaj la 100a datreveno de Ivo Lapenna, eldonitaj en 2009.

GK UEA

Esperanto en la Pollanda Senato

En la Pollanda Senato (la supera ĉambro de la parlamento) la 9an de majo okazis renkontiĝo de reprezentantoj de la Estraro de EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) kaj de la Estraro de la Pollanda Asocio EDE kun la vicprezidanto de Pola Senato Jan Wyrowiński kaj aliaj parlamentanoj kaj reprezentantoj de la Pollanda-Japania grupo de la Senato. La renkontiĝo estis dediĉita al la 125a datreveno de la kreo de Esperanto.

Honora gasto de la renkontiĝo estis Etsuo Miyoshi, prezidanto de la kompanio *Swany*, filantropo kaj granda populariganto de Esperanto. Etsuo Miyoshi diris, interalie: “Providenco donis al vi Zamenhofon. Esperanto estas lingvo konata en la tuta mondo kiel Pollanda eltrovo”. Li emfazis, ke multaj eminentaj sciencistoj, verkistoj, politikistoj, papoj kaj Nobelpremiitoj kun granda aprobo opiniis pri Esperanto.

Dum la renkontiĝo oni diskutis ŝancojn utiligi Esperanton mondscale. Gastoj instigis al fondo de parlamenta grupo por apogi Esperanton. Je la fino de la renkontiĝo la vicprezidanto de la Senato enmanigis al Etsuo Miyoshi la Senatan memor-medalon.

Pli frue, la 6an de majo Etsuo Miyoshi renkontiĝis en la urbo Sopot kun la senatano Edmund Wittbrodt kaj kun membro de la Eŭropa Parlamento Jan Kozłowski.

Laŭ www.senat.gov.pl

La Ago-Tago ne nur en oktobro

La Ago-Tago estas parto de la tradicioj de nia movado, kaj ĝi okazas en la unua sabato de oktobro. Tamen en Brazilo reklami pri Esperanto en oktobro estas neoportune, ĉar jam en la komenco de decembro komenciĝas la grandaj someraj ferioj, kaj la lernejoj rekomencas la instruadon nur post la karnavalo. Do, ni disdonas informilojn en la komenco de oktobro kaj la lecionoj komenciĝas nur en marto. Tiam la homoj jam tute forgesas pri nia kurso.

En 2011 la brazilanoj komencis diskuti pri la plej taŭga dato, kaj la rezulto de la balotado estis la 3a de marto, post la karnavalo, unu aŭ du semajnojn antaŭ la novaj kursoj de Esperanto.

Krome ni diskutis ankaŭ la enhavon de la varbiloj kaj pri la celata publiko. Ĉi-jare ni preferis uzi mallongajn rektajn tekstojn, kiujn la homoj povas legi dum okulfrapo. Ni konsilis al grupoj partoprenantaj la Ago-Tagon, ne disdoni la informilojn hazarde sur stratoj, sed disdoni preferinde al studentoj proksime de universitatoj kaj lernejoj.

Ni presis 30 mil flugfoliojn, kiuj estis senditaj al 50 Esperanto-grupoj. Tiu kvanto estas nur guto da informo en la grandega Brazilo, sed ĝi estas bona komenco, kaj ni esperas ke en la venontaj jaroj, aliaj lokaj grupoj konsideros la avantaĝojn de la nova dato kaj ankaŭ partoprenos.

Emilio Cid

Kia estus Eŭropo sen EU?

“Kia estus Eŭropo nun, se ne ekzistus Eŭropa Unio?” Por respondi al tiu demando, kunvenis ekde la 9a ĝis la 11a de majo en Triesto, nord-orienta Italio, 140 personoj el pluraj Eŭropaj landoj.

Fakte Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kunlabore kun la Triesta Esperanto-Asocio okazigis tritagan konferencon al kiu partoprenis ne nur gravuloj (pri kiuj mi diros poste), sed — plej grave — sesdeko da neesperantistaj studentoj pri ĵurnalismo el universitatoj de Aŭstrio, Ĉeĥio, Kroatio, Slovenio kaj Slovakio, kiuj ne nur aŭskultis la prelegojn, sed debatis poste en laborgrupoj, sub gvido de universitataj profesoroj, la ideojn, la temojn de la prelegoj mem. La Konferenco estis ĉefa parto de projekto financita fare de la programo “Eŭropo por la civitanoj”.

Mi partoprenis plurajn tiajn internaciajn aranĝojn, sed mi devas diri ke ĝi estis vere kaj tute profesie organizita kaj malfacilas trovi ion kritikindan.

Unu tagon antaŭ la malfermo, alvenis speciala medalo de la prezidento de la Itala Respubliko, Giorgio Napolitano, kiel premio por la organizanta asocio; okazaĵo tre malofta en Italio. Kompreneble post tio ŝajnas preskaŭ ŝablonaj la patronecoj de Regiono, Provinco, Komunumo kaj Universitato Triesta!

Sed ni revenu al la konferenco, kiun mi ĝuis de tute nova vidpunkto. Mi sidis fine de la salono, en interpretista budo, kaj havis tute alian rigardon al la tuto. La salono estis plenplena, la homoj ne endormiĝis, pluraj intervenis en la debato, ne per rutinaj konstatoj sed per pensigaj demandoj, sed... ĉu povintus esti aliel kiam oni havis la eblecon aŭskulti du eksajn ŝtatprezidentojn, du eŭroparlamentanojn, unu eksministron pri eksterlandaj aferoj, unu eksprezidanton de la kristan-demokratiaj partioj de la Eŭropa Parlamento, la prezidanton de la Unesko-Centro de Trieste, kelkajn diplomatojn, kaj universitatajn profesorojn, kaj — atentu bone — preskaŭ ĉiuj el ili ne estis esperantistoj!

Ĉu vi jam pentas ke vi ne veturis al Triesto? Tute prave!

Estis tre interese aŭdi en la historia sesio pri la origino, kialoj kaj disvolviĝo de la Eŭropa unuiĝo far Thomas Jansen, iama prezidanto de PPE. Kaj pri la starpunkto de la sloveno Božo Repe, universitata profesoro en Ljubljana, pri la ĵusa aliĝo de lia lando al EU. Kaj fine, pri la influo de Eŭropa Unio por atingi pacon

en Nord-Irlando, kompreneble el la voĉo de Seán Ó Rian, diplomato kaj prezidanto de EEU.

Kaj en la politika sesio aliaj gravaj kontribuantoj: Stjepan Mesić, iama prezidento de Kroatio, parolis tre vigle pri ĉu la sudorienta Eŭropo havas alian alternativon krom Eŭropa Unio? dum lia kolego Milan Kučan, iama prezidento de Slovenio, lando kiu jam estas en EU, parolis pri spertoj el la plurnacia ŝtato Jugoslavio kiel mesaĝo al EU. Estis poste la vico de Eŭro-parlamentano Giorgio Rossetti kiu traktis tiklan temon: “Ekonomio kaj/aŭ politiko? Eŭropa integriĝo ĉe decida vojkruciĝo”: ĉu iu temo povus esti pli aktuala ol tio?

Sekvis la sesio pri ekonomio, en kiu tri universitataj profesoroj (Mladen Staničić el Kroatio, François Grin el Svislando, kaj Stefano Amadeo el Italio), pri-traktis la fiskan kunordigadon, la dinamikon de lingvoj: ĉu la lingva ekonomio povas helpi kaj la socian solidarecon en EU post la traktato de Lisbono.

La lasta sesio temis pri la homaj rajtoj kaj estis tie alfrontataj: la problemoj de la handikapitoj precipe rilate al instruado, fare de prof. Paolo Alessi, de la tiea universitato kaj prezidanto de la Unesko-Centro de Trieste; la identeca karaktero de lingvoj, fare de Zlatko Tisljar, sekretario de EEU kaj la religio kaj la Eŭropa identeco far Antonio Cancian, eŭrodeputito, fluganta al Trieste de Bruselo nur por partopreni la konferencon.

Sed tio ne estis ĉio! Ĵaŭde posttagmeze la organizantoj regalis la konferencanojn kaj la lokan publikon per tre

interesa Publika Ronda Tablo pri la graveco de EU por konservado de la paco en Eŭropo kaj en la mondo, al kiu aktive kontribuis Stjepan Mesić, Milan Kučan, Gianni De Michelis (eŭrodeputito, iama itala ministro pri eksterlandaj aferoj) kaj d-ro Thomas Jansen.

Mi konscias ke tiu ĉi simpla listigo de temoj kaj homoj vekas en la legantoj la bedaŭron pro malĉeesto, sed vi havos almenaŭ la okazon legi la prelegojn ĉar estos, kompreneble, eldonataj la aktoj de la konferenco.

Ĝuu la legadon, samkiel oni ĝuis la aŭskultadon de la prelegoj de tiu impona konferenco, nova ĉenero en la jam longa ĉeno de altnivelaj kongresoj kaj konferencoj plej diversaj, zorgata de la Triesta Esperanto-Asocio sub la firma gvido de la prezidanto Edvige Tantin Ackermann.

Michela Lipari

SAT en la Tago de la Laboro

La 1an de majo SAT-anoj partoprenis en surstrataj sindikataj manifestacioj almenaŭ en Otavo, Londono, Olten (Svisio), kaj plej videble en Parizo — tie estis kolektitaj subskriboj por la petskribo pri aldono de Esperanto kiel nedeviga ekzamenfako en la franca abiturientekzameno. Ĉirkaŭ du mil scivoluloj memstare venis al la informbudo por kapti flugfoliojn, kaj iuj el ili aĉetis lernolibrojn, vortaretojn, insignojn, kaj plurlingvan libron pri la Indignuloj, enhavantan plurajn Esperantajn tekstojn, kiujn freŝe aperigis la neesperantista eldonejo *ABC Editions*.

Vinko Markovo



Esperanto estis videbla la 1an de majo en Parizo.

Hispanio: Kongreso en urbeto

En la ĉarma urbeto Almagro (provinco Ciudad Real) disvolviĝis de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo la 71a Hispana Kongreso de Esperanto. La kongresurbo kun malpli ol dek mil loĝantoj multe prosperis en la 17a jarcento sub la influo de la bankista germana familio Fugger, dum la regado de la imperiestro Karolo la 5a. Restas pluraj tiuepokaj konstruaĵoj, inter kiuj ankaŭ la Palacio de la Grafoj de Valparaíso, centra ejo de la kongreso konstruita en la jaro 1699.

Aparte belas la Corral de Comedias aŭ komedikorto, sentegmenta teatrejo de la 17a jarcento, kiu konserviĝas senŝanĝe. Okaze de la tradicia spektaklo, nur la vestaĵoj, ĥar-aranĝoj kaj la fotiloj de la publiko “krom la fakto, ke ili babilis Esperante kaj ne en la Cervantesa lingvo” klarigis ke ni vivas en la 21a jarcento.

Dum la kongreso, Alejandro Pareja gvidis la lingvajn kursojn por komencantoj kaj Jorge Camacho rolis kiel lerta interpretisto en la vizito en Almagro, ĉe la vin-gustumado kaj dum la ekskurso al la ventmuelejoj en Campo de Criptana.

Samkiel pasintjare en San Lorenzo de El Escorial, denove oni prelegis per peĉakuĉoj, vigla metodo en kiu oni komentas 20 bildojn po 20 sekundoj.

Dimanĉe okazis ĝenerala kunveno de HEF por pretigi agadojn okaze de la 125a datreveno de la lingvo, kaj Toño del Barrio estis konfirmita kiel prezidanto. Poste, ne nur la pli ludemaj kongresanoj ĝuis la prezentadon de *Talismano*, kartludo kreita de Abel Montagut ĉirkaŭ “Don Quijote kaj verdaj Donkiĥotoj”.

La kongresanoj en la bela kongresejo (*Fotis Pedro Hernández*)



Inter la artaj agadoj, krom la projekciado de filmoj pri Esperanto, oni devas elstarigi *Vivu la Teatro*, prezentita de Ana Manero kaj Miguel Fernández kaj partoprenita de dekduo da esperantistoj kaj de la aktorino Laura Pascual, kiu bonege rolis en fragmento de la *Sanga nupto* de Federico García Lorca (tradukita de Miguel Fernández).

Ankaŭ muziko ege kontribuis al la amika etoso. Kvaropo *Sinkopo* koncertis post la solena inaŭguro, kaj lunde la tre simpatia loka kanzonisto Alejandro Cerro preparis la vojon por la koncerto de *Kaj Tiel Plu*. La kataluna grupo ludis plurajn tradiciajn okcitanajn kaj sefardajn kantojn esperantigitajn de ili kaj ankaŭ popolkantojn de la Hispana Enlanda Milito.

La kongreso omaĝis la Iberan Skolon okaze de ĝia 20a datreveno kaj ĝuis la partoprenadon de Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez Adúriz, Jorge Camacho, Abel Montagut kaj “ilia muzo” Ana Manero.

Mardon matene, Ana Manero prezentis la novajn atingojn kaj celojn de la Bitoteko, fierinda projekto de HEF malfermita al la tuta esperantistaro (*vd. LODE*, 2012, №4, p. 14).

Krom la menciitaj prelegantoj kaj respondeculoj de la programeroj, la kongreso sukcesis danke al la prizorgoj de Jesús García Cano, Raúl Martínez Anguita kaj aliaj membroj de la Loka Kongresa Komitato kaj de la senlaca prezidanto de HEF Toño del Barrio. Kaj kompreneble ankaŭ danke al la centoj da partoprenantoj. La hispana gazetaro sufiĉe bone eĥis la eventon

Javier Guerrero

Sude, sed ne side, kaj ne acide

En la belega sudhungaria urbo Szeged la 28–30an de aprilo okazis JER (Junulara Esperanto-Renkontiĝo). Ĝi estas tradicia printempa renkontiĝo de HEJ (Hungara Esperanto-Junularo), kies organizan teamon ĉi-foje kompletigis grupo de lokaj studentinoj de Esperantofakmanagĉerado. Krom hungaroj ĉeestis esperantistoj el Kroatio kaj Ĉeĥio, kio igis la etoson internaci(et)a.

Por klarigi la vortludan titolon menciindas, ke promenoj kaj ebloj de urbo-esplorado abundis, unue ĉar Szeged estas mirinde bela (ne nur laŭ hungaroj!), kaj due ĉar la vetero estis somerece varma. Dum tiuj fojoj, post la registriĝo kaj interkonatiĝo, ni povis ekkoni la lokon dum la urba ludo gvidita de la szegedanoj. Poste ni rigardis la grandegan katedralon (la simbolo de la loko) kaj ĝuis tie Esperantan gvidadon de loka muzeologo, kiu prezentis al ni ankaŭ kelkajn ekspoziciojn. Ni eĉ vizitis unu el ĝiaj turoj — kio signifis grimpon de 280 ŝtupoj, sed rezultigis ampleksan elvidon, eĉ landlimojn superantan.

La neurbaj programeroj okazis en la studenthejmo. Diversaj ludoj, ekzemple, E-ktiviti (Esperanto-versio de Activity), kunkantado kaj koncerto de Anjo Amika, prelego pri nova Esperanta romano kaj projekciado de germana (Eo-subteksta) komedio atendis la partoprenantojn. Ankaŭ menciindas neesperanta, sed furora programero de la unua nokto: koncerto de junula bando kun “mondmuziko” (vigla miksaĵo de pluraj stiloj, ekzemple: popola, klezmera kaj moderna muziko). Sekve, ne mankis noktumoj kaj iom malfacilaj vekiĝoj, sed feliĉe nenian severan problemon ili kaŭzis (eble ĉar la ejo enhavis ankaŭ kafo-maŝinon).

Ĝenerale estis gaja renkontiĝo, kiu sukcesis konvinki ankaŭ komencanto(j)n pri la indeco de la Esperantolernado kaj vizito de tiaj kunvenoj.

Kompreneble, kiel ĉiam, estis ankaŭ kelkaj malgлатаĵoj, kiujn ni, la organizantoj, klopodis kiel eble plej rapide solvi. Feliĉe (kaj ŝajne) ili ne iĝis tro ĝenaj. La kunordigo kaj la prizorgo de JER estis certe bona eblo por ni ekzameni kaj evoluigi niajn organizajn kapablojn. Ni esperas, ke ĉiuj partoprenantoj bonfartis, kaj ili — sed ne nur ili — ĉeestos ankaŭ dum IJS, kiu estas la ĉefa, pli granda kaj somera internacia aranĝo de HEJ.

Sarolta Bagó

En la Esperanto-urbo

Ekspozicio pri fervojo

Okaze de la 64a Internacia Fervojista Kongreso, okazanta en Herzberg am Harz, Interkultura Centro Herzberg (ICH) pretigis ekspozicion en la Esperanto-ĉambro de la Welf-kastelo. Temas pri la historio de la fervojista Esperanto-movado, pri la rolo de Joachim Gießner. En la vitrinoj estas videblaj interesaj fotoj, kongresaj materialoj, insignoj, poŝtmarkoj, glumarkoj, faldfolioj, faklibroj, fakaj gazetoj kaj poŝtkartoj el multaj landoj. La materialoj estas el la kolektaĵoj de Peter Zilvar kaj la biblioteko de la Esperanto-Centro. La ekspozicio restos ĝis somero.

Gaste ĉe Harz-Klub Herzberg

ICH ricevis inviton de Harz-Klub Herzberg al ties jarkunveno por prezenti Esperanton kaj la evoluon de la Esperanto-urbo. Inter preskaŭ cent partoprenantoj ĉeestis ankaŭ la urbestro Gerhard Walter. Friedrich Meyer, prezidanto de Harz-Klub, en sia festparolado emfazis la gravecon de Esperanto por Herzberg. La mallonga prelego de Peter Zilvar pri Esperanto-aktivecoj en kaj por la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kun la samtempa bildprezentado de Zsófia Kóródy, vekis grandan intereson kaj ricevis laŭdon kaj aplaŭdon.

Je la fino de la kunveno Inda, juna staĝanto el Hispanio, kantis en Esperanto kaj ludis gitaron. Ewa Kukielka kaj Ursula Zilvar (estrarininoj de Esperanto Societo Südharz) kaj Ida Havasi, gasto el Hungario, disdonis varbilojn, respondis demandojn kaj babiladis kun klubanoj. Estis bonsukcesa sinprezento, varbado por Esperanto en tiu loka klubo, kun kies membroj plioftiĝas kontaktoj, ekzemple, dum ekskursoj en la Harz-montaro.

Studentoj gastas ĉe ICH

Grupo de universitataj studentoj el Emden sub gvido de Sebastian Kirf pasigis en majo kvar tagojn en Herzberg por lerni Esperanton en la Esperanto-domo. Krom aktiva lernado, kiu donis al ili oficialajn kreditpoentojn, ankaŭ la libertempo kun kradrostadfestoj kaj babilado en la “verda urbo” ne mankis. Ili ĝojis pri la fruktodonaj interparoladoj kun lokaj, hispanaj, polaj kaj slovakaj geesperantistoj.

La studentoj ankaŭ ĝojis pri la granda biblioteko, multaj esperantlingvaj indikiloj, vojmontriloj, manĝokartoj, ktp. Ili intencas reveni por daŭrigi la studadon de Esperanto. La regiona gazeto *Harz Kurier* informis pri tiu vizito.

ICH



La regiona gazeto *Goslarsche Zeitung* aperigis tutpaĝan raporton pri la 125-jara lingvo Esperanto, ĝiaj valoroj, aktivado de ICH, Esperanto-lokoj, monumentoj, servoj en la Esperanto-urbo Herzberg.

Renkontiĝo super Mozela valo

La 3a PRINTEMPE estis mia unua renkontiĝo, kaj ĝi plaĉis al mi. Ĝi okazis 5–12 apr 2012 en la kastelo Marienburg, kiu konsistas el etosplenaj domoj, belege situantaj inter vinberejoj, borde de la rivero Mozelo apud la ĉarma urbo Zell. La domaro Marienburg estas eksa kastelo kaj monaĥejo, nun havanta komfortajn dormĉambrojn kaj kunvenejojn. La manĝoj bongustis, nur la vetero ne ĉiam estis bona kaj varma.

Dum la tagoj ni faris ekskursojn, promenojn, kafumis, aŭskultis prelegojn, zorgis pri la komencantoj kaj babilis pri Esperanto, la mondo kaj la tuta resto. Vespere ni malstreĉiĝis per vingustumado, diskutoj, prelegoj kaj fotomontrodo aŭ simple per legado aŭ dormado.

Jen kelkaj pliaj programeroj:

— vizitado de: eksvulkanaj lagoj, ĉarmaj urboj, varmbanejo de Bad Bertrich, turo apud la kastelo Marienburg, radia teleskopo Effelsberg, aŭtokurejo Nürburgring;

— prelegoj pri: Anguloj ĉe fotado (Alfred), Gramatiko kaj literaturo de Esperanto (Christian), Mongolio (Marcel), Merkatiko (Lu);

— fotomontrodo de Marcel kaj Paulo, Jutta;

— kuracplanta promonado kun Die-mante kaj Monika;

— pentraĵoj faritaj de Lukas.

Angelika Dürre

BMI: Nova Esperanto-Domo

La 5an de majo okazis solena inaŭguro de Becker-Meisberger-Instituto (BMI) en Blieskastel/Saar. La honoraj gastoj de la ceremonio estis la urbestro de Blieskastel Annelie Faber-Wegener kaj la nobelpremiito prof. d-ro Reinhard Selten kiu venis kun akompano de prof. d-rino Robin Pope el Aŭstralio.

La urbestro Faber-Wegener kaj la direktoro de BMI Oliver Walz kune bonvenigis la gastojn. La urbestro menciis la ĝemelurbojn de Blieskastel kaj montris intereson kunlabori kun la instituto rilate al la interkultura komunikado. Oliver Walz diris, ke Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) vere ne povus trovi pli taŭgan lokon por la instituto ol Blieskastel.

Pliaj salutparoladoj sekvis de prof. Robin Pope kaj Wolfgang Bohr, kiu salutis en la nomo de la Germana Esperanto-Asocio kaj kiel prezidanto de la landa asocio Rejnlando-Palatinato pledis por kunlaborado kun la instituto. Poste salutis la vicprezidanto de la faka altlernejo Zweibrücken, prof. Hans-Joachim Schmidt kaj la prezidanto de la partio CDU Holger Schmidt. Kelkaj gastoj venis el eksterlando kiel Teresa Liberska el Pollando kaj Mieke Sakuda el la malproksima Okinavo.

La direktoro de BMI faris ampleksan prezentadon de la taskoj kaj celoj de la instituto. En ĝi troviĝas la oficejo de SEL; okazas tie estrarkunsidoj, membrokunvenoj, ekspozicioj kaj diversnivela Esperanto-kursoj. La instituto ofertas diversajn prelegojn kaj seminariojn en Esperanto kaj en la germana. BMI disponas ampleksan bibliotekon kaj arkivon kun aŭdvida centro. En la domo estas ankaŭ tranoktebleco por ok gastoj. Prefere oni invitu al BMI samideanojn, kiuj antaŭpreparas doktoran disertacion pri esperantologio kaj interlingvistiko.

Vicprezidanto de SEL Edgar Werner Müller prelegis pri la temo “Esperanto hodiaŭ”, estrarano de SEL Josef Dörr pri esperantologio kaj interlingvistiko, prof. Markus Groß pri la mondaj lingvoj en la historio de la homaro. La kulmino estis tiam la festparolado de Prof. Dr. Reinhard Selten “Mia vivo kun kaj por Esperanto”. Poste la direktoro de BMI nomumis profesoron Selten honora membro de SEL kaj dankis lin pro lia veno kaj pro la grandega laboro por Esperanto. Post la inaŭgura ceremonio la gastoj ĝuis la posttagmezon ĝis vespere kun bongustaĵoj kaj bavara biero el barelo.

Oliver Walz

Je la Pasko en Bonn

Inter la 2a kaj la 9a de aprilo okazis la 28a Printempa Semajno Internacia en Bonn. En ĉi tiu tradicia Paska renkontiĝo, kiun okazigis la Germana Esperanto-Asocio kaj la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, partoprenis 120 personoj el pluraj landoj. Krom familioj, ĉeestis ankaŭ multaj plenkreskuloj kaj junulara grupo el Portugalio kun siaj instruistoj.

Al la jam konataj kaj ŝatataj programeroj por infanoj apartenis diversaj manlaboroj, la MAZI-lingvokurso kaj la kaosludo, dum kiu ankaŭ plenkreskuloj kuris tra la domo serĉante kaŝitajn paperslipojn kaj plenumante diversajn taskojn.

Ankaŭ seriozaj prelegoj, ekzemple pri la muzikisto Franz Liszt, pri la komparo inter planlingvoj, aŭ pri la signifo de publikaj rilatoj okazis en la taga programo. Ekskursoj kondukis partoprenantojn trajne al la najbara urbo Köln, ŝipe al la proksima kastelo Drachenburg kaj bicikle laŭ la rivero Rejno.

“Kiu volas iĝi milionulo?”, — oni demandis vespere en la Esperanta versio de la mondvasse konata televida kvizo, kiun preparis junaj esperantistoj el Britio kaj Germanio. Dum aliaj vesperoj oni ĝuis koncertojn kaj amuziĝis dum prezento de la profesia pupteatraro Christof Frank. Poste eblis spekti ĝisnokte filmojn kun zorgeme esperantigitaj subtekstoj.

Informiĝi pri la venontjara PSI en St. Andreasberg en la Harz-montaro:

www.esperanto.de/psi

Petra Dückerhoff

Televido ĉe IEI

La 31an de marto 2012 okazis nekutima librolega tago en la biblioteko de Internacia Esperanto-Instituto en Hago (Nederlando). Matene la 14 aliĝintoj povis ankoraŭ profundigi en la verkoj de Waringhien, Piron kaj De Seabra, kiujn enkondukis Ed Borsboom kaj Anne Jauissions, sed posttagmeze tio ne plu eblis.

Tiam invadis la domon dum tri horoj teamo de la nederlanda televida kompanio MAX. Ili filmis la hisadon de la Esperanto-flago, fiksitis esperantlingvajn frazojn de la partoprenantoj kaj intervjuis la kursestron pri la nuna stato de Esperanto.

La rezulto estis elsendita dum kvarminuta spektaklo en multe vidata programo la 16an de aprilo 2012.

Ed Borsboom

Inter utopio kaj realo

Okaze de la 100a dat-reveno de la morto de prelato Johann Martin Schleyer la aŭtoro de Volapük, kaj la 125-jara ekzisto de Esperanto Bavara Ŝtata Biblioteko (BŠB) en Munkeno aranĝos ekspozicion *Inter utopio kaj realo. Konstruitaj lingvoj en globalizita mondo*.

La solena malfermo de la ekspozicio okazos jaŭdon, la 14an de junio 2012, je 19:00 en la biblioteko (Ludwigstr. 16) far D-ro Rolf Griebel, ĝenerala direktoro de BŠB. La biblioteka koruso prezentos kantojn en Volapük kaj Esperanto. Enkonduka referato pritraktos la temon “Kio estas kaj kiu-cele oni okupiĝas pri interlingvistiko?”

Vendredon, la 15an de junio, okazos tut-taga simpozio kun prelegoj de

— Prof. D-ro Heiner Eichner, Universitato de Vieno

— Reinhard Haupenthal, iama instru-komisiito por esperantologio kaj interlingvistiko, Universitato de Sarlando

— D-ro Ulrich Lins, historiisto, Bad Godesberg

— Mag. Herbert Mayer, gvidanto de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperanto-Muzeo de Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno

— Prof. D-ro Gerhard F. Strasser, Pennsylvania State University, Ludwig-Maximilian-Universitato, Munkeno.

La prelegoj aperos libro-forme en volumo akompananta la ekspozicion (prezo: ĉ. 20 eŭroj).

Aliĝu ĉe: veranstaltungen@bsb-muenchen.de (malfermo) kaj ĉe baes.sekretariat@bsb-muenchen.de (simpozio). En la reto sam-tempe okazos virtuala ekspozicio.

Reinhard Haupenthal



Litovio: Esperantisto honorita

La 17an de aprilo 2012 en la ŝtata muzika teatro de Kaŭno (Litovio) okazis solena ceremonio “Vilaĝaj lumradioj de Litovio 2011”, organizita de la Litovia agrikultura ministerio. En la branĉo “Vilaĝa libroportanto” laŭreatiĝis konata litova esperantisto Petras Čeliauskas el la urbeto Švėkšna — multjara redaktoro de la gazeto *Litova Stelo*, tradukisto, Honora Membro de UEA.

Evidente Čeliauskas estas elektita ankaŭ pro tio, ke antaŭnelonge estis premiere prezentita lia ampleksa enciklopedio *Švėkšna: homoj, regiono, eventoj*, pri kiu li laboris dum multaj jaroj.

La ceremonion partoprenis kaj ĉiujn laŭreatojn gratulis la Litovia prezidento Dalia Grybauskaitė. Dum la prezentado estis montrita mallonga filmeto pri Čeliauskas; oni montris librojn, kiujn li verkis kaj tradukis, ankaŭ librojn en Esperanto. En la festo prezentiĝis konataj kantistoj, dancistoj, orkestro.

Okaze de la evento en la katedralo de Kaŭno okazis speciala sankta meso dediĉita al la laŭreatoj. Litoviaj amas-komunikoloj raportis pri la laŭreatoj, ankaŭ pri Petras Čeliauskas. Litova Ŝtata Televido montris la 1an de majo specialan programon pri la ceremonio.

Povilas Jegorovas

TEJO: Novaj komitatoj B

Paweł Fisher-Kotowski el Pollando, Wang Shanshan el Ĉinio, Ronald Baby González el Kubo/Hispanio kaj Magnus Henoĥ el Svedio/Britio estas novaj Komitatoj B de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ili estis elektitaj per baloto de Individuaj Membroj de TEJO. Ili oficos de junio 2012 ĝis majo 2014. La elektitoj ricevis respektive 21 (66%), 20 (63%), 18 (56%) kaj 16 (50%) voĉojn.

La voĉdonado okazis marte kaj aprile 2012 pere de balotiloj senditaj paperpoŝte al Centra Oficejo, kaj ĝi estis la unua tia baloto post dek-jara paŭzo (en antaŭaj jaroj ne estis sufiĉaj kandidatoj por ke voĉdono okazu). Ĉiu rajtis voĉdoni por maksimume 4 el 7 kandidatoj. La neelektitaj kandidatoj estas Zsófia Pataki (Hungario/Pollando, 15 voĉoj, 47%), Przemysław Wierzbowski (Pollando, 14 voĉoj, 44%) kaj Sébastien Denux (Francio, 8 voĉoj, 25%).

La sekva balotado povos okazi post du jaroj.

Łukasz Żebrowski
Prezidanto de TEJO

SAT-Amikaro: Ĉu statutsanĝo?

La 67a kongreso de SAT-Amikaro devis okazi en Burĝo (Bourges), tamen ĝis okazis en Ĉatoruso (Châteauroux) inter la 7a kaj la 10a de aprilo 2012 kun 102 kongresanoj, sed la etoso rilatfaciligaj kaj familia.

Kiel en la vivo, dum la kongreso estis tempo por paroli, interŝanĝi, diskuti, labori kaj cerbumi sed ankaŭ por distriĝi kaj ridi. Sabate posttagmeze ni vizitis Ĉatoruson dank' al du simpatiaj gvidantinoj, kiuj dum pli ol du horoj malkovrigis kaj komprenigis al ni la urbon. Vespere ni malkovris novan teatran trupon *Kvak*, kies kvar junaj bonaj aktoroj entuziasmigis nin. Kelkfoje la parolmaniero ne estis tute precize klara kiam ili parolis ege rapide, sed ilia ludo estis bonega kaj doloraj sentoj de Karotkapo kaj de aliaj kortuŝis nin. Poste okazis ankoraŭ koncerto kaj kant-animado.

Dimanĉon komencis la cerbumado: la unua laborkunsido preparis la tri posttagmezajn laborgrupojn: Estonto de la gazeto *La Sago*; Reskribado de la statuto de SAT-Amikaro; Akcepto de novuloj kaj nemembroj kaj prezentado de SAT.

London la tria laborkunsido raportis al ĉiuj konkludojn de la laborgrupoj. Ĉiuj povis sin esprimi kaj aŭskultiĝi. Diskuto, eĉ impetega, restis diskuto kaj ĉiuj klopodis ankoraŭ kaj pli bone sin klarigi aŭ serĉi kiel trovi bonan kompromison.

Aliflanke, eĉ ĉe SAT-Amikaranoj, ŝanĝi ne estas facila afero. Trovi novajn kandidatiĝojn por la komitato 2013 ne eblis, do la nova komitato similas la malnovan, sed ĝi nun enhavas nur ses komitatanojn, ĉar Vito Markovo ne re-kandidatiĝis kaj neniu anstataŭis lin.

Kelkaj proponis reskribi la statuton de SAT-Amikaro kaj ŝanĝi en ĝi kelkajn esprimojn, ekzemple: “lutte des classes”, “milieux d’avant-garde”, “propagande”. Ni multe diskutis pri tio, sed fine ni proponis ... daŭrigi la diskuton por proponi ideojn por ... la proksima kongreso.

Certe mi estus povinta paroli ankaŭ pri la interesege prelego “Atomo kaj socio” aŭ pri la ĝoja tempo de “Humoro en *La KancerKliniko*”, kiam ĉiuj bone ridis, aŭ pri la belega ekspozicio de libroj en la libro-servo, aŭ, aŭ, aŭ... sed estas tro por diri, tio ne eblas.

La venontaj kongresoj de SAT-Amikaro okazos en Métabief (2013), Amiens (2014) kaj Fraize (2015).

Isabelle Lamy-Rested



Hans, Miguel kaj Claude antaŭ la Kastelo Grésillon, kiu servas al la tuta esperantistaro.

Ekzameno en kastelo

Kadre de la Printempa Semajno en la Esperantista Kulturdomo “Kastelo Grésillon” 27 personoj sekvis kurson por prepari sin ĉu al la ekzameno B1 kun Christophe Chazarein, ĉu al B2 kun Zsófia Kóródy. Nia kuba amiko Miguel González instruis al la komencantoj.

La vetero estis pli vintra ol printempa... nia nova hejtado do funkciis en la kastelo, kaj Zsófia elektis la salonon por kursadi anstataŭ la klasĉambron en la kromdomo kaj ne volis ekzameni en la granda Zamenhof-salono! Tamen la etoso estis varma — la partoprenantoj donis bildon de tre amika grupo, kaj ili fintrinkis tri barelojn da Anjua ruĝa vino dum niaj bonaj manĝoj, preparitaj de Sunjo kaj Ronan.

Je la fino de la semajno ni akceptis pliajn ses personojn kiuj venis por KER-ekzamenoj. Kelkaj personoj, kiuj vizitis Grésillon en printempo 2011 kaj trapasis tiam la ekzamenon B1, revenis en 2012 kaj trapasis B2 ekzamenon.

Nia printempa semajno ĉi-jare komenciĝis per seminario pri mondvojaĝado, Mireille Grosjean regalis nin per rakonto pri siaj spertoj en Afriko kaj Azio. Gravas por ĉiu pli bone kompreni nian hodiaŭan mondon, kiam la ekonomia sistemo iĝas tutmonda, kaj kiam ĉiuj popoloj devas dispartigi la trezorojn de nia nura Tero.

Oni multe studis, sed ankaŭ promenis, muzikis kaj eĉ popol-dancis dank' al la akordeono de Marcelline.

Jannick Huet-Schumann

Staĝo en limregiono

La kvara staĝo por lerni kaj praktiki Esperanton disvolviĝis 23–28 apr en Nilvange (nord-orienta Francio). La loka asocio Esperanto Thionville kaj Franca Fervojista Esperanto-Asocio, kiuj kunorganizis la staĝon, allogis pli ol dudek partoprenantojn el Belgio kaj Francio por riĉa programo.

Ĉiumatene Renée Triolle gvidis paroligan kurson por spertuloj, Josée Lafosse animis kurson por progresantoj, Antonio Quijada instruis komencantojn.

Ĉiuposttagmeze estis vizitado de la limregiono: romiana vilao Borg en Germanio, fuortoj kaj tombejoj en Douaumont kaj Vaux apud Verduno en Francio, Nacia Fermineja Muzeo en Rumelange en Luksemburgio, kaj finfine Thionville grava ekonomia Lorena urbo en Francio.

Ĉiuvespere okazis kultura programo, kadre de kiu estis montrita filmo de Bernard Vivier kaj Marie José Behm pri vojaĝo en Hamburgo en 2011 kaj filmo pri la 96a Universala Kongreso en Kopenhago (2011), Thomas Cordonnier prezentis liberajn programarojn kiel Linukso, Renée Triolle montris bildojn pri Uralo en Ruslando.

Ĉiuj estis kontentaj pri la programo kaj manĝaĵo en bona etoso. La regiono estas verda kaj belega apud tri najbaraj landoj (Belgio, Luksemburgio, Germanio), kaj la restado estas malmultekosta. Ni rendezuos post unu jaro. Por instigi lernantojn paroli Esperante, ni serĉas alilandan instruiston.

Bruno Henry



Sukcesa instruado en Sicilio

Bone disvolviĝas nova projekto de la Itala Esperantista Federacio, lanĉita de la konata esperantisto Brunetto Kassini, pri establo de la Internacia Centro de Interkulturo en Mediteraneo en la urbo Mazara del Vallo (Mazaradelvallo) ĉe la okcidenta bordo de la insulo Sicilio.

Ekde januaro 2012 Esperanto estas instruata en deko da lernejoj, du liceoj (scienco kaj arta), al instruistaro de la urbo kaj oficistoj de la urbodomo. Pli ol 500 personoj estas lernantaj la internacian lingvon en la urbeto. La prepara laboro, varbado, reklamo estis grandiozaj. La skipo de instruistoj-volontuloj estas internacia, nun estas laborantaj hungarino Márta Kovács kaj rusino Svetlana Smetanina kun organiza helpo de Kassini.

La infanoj estas ĉarmaj, talentaj kaj scivolemaj, sed bedaŭrinde multege pli bruaj kaj maldisciplinaj ol ni atendis. Rekta metodo de instruado de fremdaj lingvoj ne estas konata ĉi tie, pro tio estas tre granda intereso flanke de instruistaro kaj aliaj plenkreskuloj, kiuj miras pri entuziasmo de esperantistoj-instruistoj.

La rilato flanke de lernejoj, instruistaro kaj direktoraro estas ege afabla kaj respektoplena, ili estas helpopretaj kaj dankemaj, malgraŭ la magra ekipo de la lernejoj. En preskaŭ ĉiuj klasoj krom dudeko-trideko da infanoj, tabulo kaj kreto estas nenio — neniuj teknikajoj kaj aliaj helpomaterialoj. Granda ŝoko por mi estis, ekzemple, foresto de interlecionaj paŭzoj kaj konstanta restado de infanaro en la klasĉambroj dum la tuta lernoperiodo. Des pli agrable estas vidi, senti kaj aŭdi la rezultojn post tiom malfacila, streĉa kaj peniga laboro!

Antaŭnelonge 75 miaj infanoj en la lernejo *Boscarino* ekzameniĝis kaj ricevis diplomojn de Itala Esperanto-Instituto. Fine de la lernojarato atendatas ankoraŭ kelkaj centoj da ekzamenotoj.

La projekto estas perfekta! Bezonatas granda kaj konstanta laboro de italaj esperantistoj pri ellaboro de unuecaj lernoprogramoj por ĉiu aĝogrupo, pri livero de bezonataj lernomaterialoj, pri plua laboro kun lernejoj, pri starigo de internaciaj kontaktoj, organizo de reciprokaj vizitoj, plifortigo de laboro de la respondeca teamo de ĉi projekto.

En aŭgusto 2012 en ĉi tiu belega urbo okazos la 79a kongreso de italaj esperantistoj, al kiu jam aliĝis centoj da esperantistoj el la tuta mondo. Ĝi estos nova instigo por la urbanoj plu lerni la lingvon, certiĝi pri funkciado de Esperanto, ekhavi amikajn kontaktojn, montri sian kulturon kaj historion.

Svetlana Smetanina

Mezorienta kunveno en Turkujo

Ĉi-printempe la Esperanto-klubo de la lernejo Uskudar American Academy organizis la 5an Mezoriantan Kunvenon en Turkujo. Ĝi okazis en Gaziantep (mezorianta Turkujo) inter la 6a kaj la 8a de aprilo kun kvardek partoprenantoj el kvin kontinentoj. La plej grandnombra grupo estis turka.

Dum la kunveno okazis diversaj kunsidoj. Kurson de Esperanto gvidis Rafaelo Mateos el Hispanujo; Mert (mezlernejo el la regiono) prezentis sian kreitan artefaritan lingvon OLESI en Esperanto kaj parolis pri la Suda Sudano; Hati kaj Ben (nia plej fidinda partoprenanto kaj amiko) prezentis sian kelkmonatan vojaĝon en la Suda Ameriko, precipe en Ekvadoro. Posttagmeze ni vizitis la malnovan urboparton.

La 8an matene ni komencis turisman vojaĝon per buseto. Nia unua ekskurscelo estis Halfeti, kie malnova vilaĝo subakviĝis post la konstruo de la digo sur Eŭfrato; tie ni faris boat-vojaĝon tra la rivero vizitante la vilaĝon survoje. Posttagmeze ni estis en Urfa, la urbo de profetoj... Ni loĝis en 300-jara domo en Urfa. Vespere la grupo de esperantistoj aŭskultis la lokan muzikon kaj dancis.

La 9an de aprilo frumatene ni ekiris al Mardin kaj pasigis tie la tutan tagon. La lastan tagon atendis nin longa vojaĝo: unue ni vizitis la monaĥejon de sirianoj, kaj poste ni vizitis Dara-n, la antikvan urbon de la persa imperiestro Dario. De tie ni direktiĝis al la kelkmil-jara urbo Hasankejĥ, kies destino estos subakviĝo post la konstruo de granda digo post du jaroj.

Murat Ozdizdar



Turkaj gelemantoj kun gastoj el Aŭstralio kaj Maroko

Dum la Ora Semajno en Tokio

En Japanio ekzistas tiel nomata “Ora semajno” — pluraj sinsekvaj feriotagoj inter la 28a de aprilo kaj la 5a de majo. Japana Esperanto-Instituto (JEI) ĉiujare dum ĉi tiu semajno organizas Esperanto-Seminarion, kutime tritagan, ie en la lando, kaj ĉi-foje en la koro de Tokio.

Nia seminario principe konsistas el ĉirkaŭ 12 horoj da lecionoj, kutime kvar-kvin diversnivelaĵoj, fakkunsidoj, ekzamenoj, Gaja Vespero (interkona vespero) kaj ofte Paradizo (tranokta babilado kun alkoholaĵoj).

Partoprenantoj venas el diversaj lokoj de la lando kaj ankaŭ el aliaj landoj; ĉi-jare venis Mireille (Mirejo) Grosjean el Svislando kaj juna ruso loĝanta en Tokio.

La elementa leciono “Ni voĉlegu imagriĉe” gvidita de Kinugasa Hirosi havis kvin lernantojn, kaj ili ekzercante kaj cerbon kaj korpon amuze ĝuis la lecionon. La mez-altan lecionon “Lude paroligaj ekzercoj” gvidis Kitagawa Hisasi kaj ĉeestis ses lernantoj. La leciono celas solidigi lingvan kapablon de progresantoj kun materialoj faritaj de la gvidanto mem. Mirejo gvidis paroligan lecionon, kiun ĉeestis 11 personoj. Ŝia energi plena gvidado donis al la ĉeestantoj bonan ŝancon ekzerci interparoladon. Ok progresintoj memstare sen gvidanto aranĝis lecionon kaj tute en Esperanto parolis pri po du temoj, kiuj traktas diversajn aferojn, kaj arde diskutis.

Mirejo Grosjean prelegis pri svisoj kaj nukleaj centraloj en fakkunsido. Ĝi multe interesis nin, ĉar demando pri nukleaj centraloj nun estas la plej arde diskutata temo en nia lando. Alia temo de fakkunsido estis KER-ekzameno okazonta tutmonde la 9an de junio. Isikawa Tiekio informis la ĉeestantojn pri la ekzameno kaj instigis ilin aliĝi al tiu ekzamensesio. Paralele kun fakkunsido okazis dispecaj ekzamenoj de JEI.

Jam delonge mankis junuloj en nia seminario, tamen feliĉe ĉi-foje troviĝis kelkaj junuloj inter ni. Manko de junuloj rezultigos malforton en nia movado, kiu en 2013 havos la 100an Japanan Esperanto-Kongreson. Nenie en la mondo oni festis la 100an landan kongreson, do estas memevidente, ke ni devas senĉese labori kaj kreskigi junajn esperantistojn por plua evoluo de la movado. Tion ni bone scias, sed kiel? Nia tasko ŝajnas nefacila sed certe farenda...

Isikawa Tiekio



Ktp: arto, poezio, kantoj, dancoj ktp.

Ktp: Ĝui artojn kaj kulturon

La rondon Ktp (www.kotopo.com) en aŭgusto 2003 fondis tiuj, kiuj amas kulturon kaj arton. La celo de la rondo estas, ke oni ĝuu artojn kaj kulturojn, libere kaj amuze, kaj prezentu siajn talentojn. Intertempe ni eldonis tri poemarojn.

La printempa renkontiĝo de la kultura rondo Ktp okazis 28–29 apr en la urbo Cheonan (Koreio). La kunveno estis tre trankvila kaj oportuna por ĝuigi ĉeestantojn. Partoprenis tridek personoj inkluzive de dek neesperantistoj — nia rondo celas kulturen renkontiĝon Esperante kaj samtempe por esperantumi kun neesperantistoj, kiuj scivolas pri Esperanto kaj pri la rondo Ktp.

Dum la renkontiĝo oni ĝuis dancoterapiadon kaj modernajn dancojn, Esperanto-kantojn kaj poemojn. Ni ankaŭ ekzercis la teatraĵon *Bebizang* prezentotan ĉi-jare en la Korea Esperanto-Kongreso.

Kara An

Israelo: La rekorda kongreso

La 13a Israela Esperanto-Kongreso okazis tre sukcese 10–12 apr 2012 en la antikva-moderna urbo Bet Shean (Skit-hopolis) kun rekorda nombro de pli ol 60 partoprenantoj, inter ili ok eksterlandanoj el kvin landoj.

Dum la unua vespero okazis nokta lum-sona spektaklo en la impona arkeologia parko. La sekvan tagon ni vizitis la kibucon Sde Elijahu, monda pioniro de organika agrikulturo, kaj la kruc-militistan fortikaĵon Belvoire (Jordana Stelo) je 500 metroj super la Jordana valo. En la lasta tago ni vizitis la aŭstralian bestĝardenon “GanGuru” kaj la basenan parkon “Sahne” kie multaj banis sin en la freŝa fonto-akvo, aliaj preferis la naĝbasenon de la kongresejo.

La kleriga programo inkluzivis prelegojn de Mikaelo Bronŝtejn (pri siaj verkoj kaj pri la urbo Vorkuta) kaj prelegon pri vojaĝo al Antarktio de Dieter Kleeman. Gian Piero Savio prezentis sian Esperanto-kurson por lernejoj kaj la hebrean version de *La Universala Lingvo*. En la arta programo JoMo kaj Bronŝtejn dancigis la kongresanojn.

Amri Wandel resumis la kongreson per foto-prezentado kaj Nava Cinori gvidis la tradician ferman diskuton. Organizis la kongreson Nava Cinori, Esti Saban kaj Amri Wandel. Eksterlandaj kongresanoj partoprenis ankaŭ unusemajnan postkongreson tra Israelo, kiun ĉiĉeronis Jehoshua Tileman, Jinon Meiri kaj Amri Wandel.

Amri Wandel

Jacugatake: La 30a kurso

La 21an kaj la 22an de aprilo La 30a Intensiva Kurso okazis en la Esperanto-Domo de Jacugatake (Japanio), kiu situas apud la monto Fuji. Ĝi estis organizita de Kantoo-Esperanto-Ligo. La partoprenantoj lernis sub la gvido de Hori Jasuo. Li instruis ilin pri tri temoj: “Zamenhof kaj historio de Esperanto”, “nia himno *La Espero*” kaj “Kiel kaj kial utili Esperanton”. Li demandis pri tiuj temoj al la kursanoj, do ili povis lerni samtempe la enhavon kaj Esperanto-konversacion. Li rekomendis al ili kanti la himnon parkere, kaj unu sukcesis kaj ricevis la atestilon.

Vespere okazis prelego de Hikita Akio, kiu partoprenis en la tre intensa kurso en Esperanto-Insulo en Ĉinio en februaro. Kaj post la vespermanĝo kun bona vino ĉiuj ĝuis “Gajan Vesperon”, en kiu okazis tre interesa loterio *bingo*, kaj ĉiuj amuziĝis. Ĉiuj estis kontentaj, lerninte ne nur Esperanton, sed ankaŭ, kial oni devas lerni ĝin serioze.

Hikita Akio



Apud la Zamenhofa monumento

Okaze de la 95a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof, la 13an de aprilo membroj de la Bjalistoka Esperanto-Societo (BES) kolektiĝis ĉe la monumento de la iniciatinto en la urbocentro.

La omaĝan ceremonion komencis salutparolo de la estraro de BES. Sekvis florkronado de la monumento. Fine grupo da infanoj vestitaj kiel ĉinoj, prezentis Esperantan infankanton. Ili lernis ĝin dum la Esperanto-lecionoj en la infanĝardeno. Estas grava afero en la urbo, ke infanoj sciu pri la utileco de fremdaj lingvoj kaj pri la ekzisto de Esperanto, kies ideo naskiĝis en Bjalistoko.

La memoradon partoprenis lokaj esperantistoj, gravuloj de la urbo, kaj krom la infanoj, ankaŭ lernantoj de liceo, kie Esperanto estas instruata. La okazaĵo allogis ankaŭ hungarajn turistojn, kiuj vizitis la urbon. La amaskomunikiloj disvastigis informon pri la evento en la lokaj gazetaroj kaj televido.

Zsófia Pataki

Olŝtino: Biblioteka ekspozicio

La 12an de aprilo en la urba biblioteko *Planeta 11* en Olŝtino (Olsztyn, la ĉefurbo de regiono Varmio kaj Mazurio en Pollando) oni inaŭguris ekspozicion de Esperanta literaturo kaj gazetararo. Tiu ĉi evento estas unu el kelkaj aranĝoj organizataj ĉi-jare kadre de Olŝtina festado de Jubilea Jaro de Esperanto.

Dum la malfermo de la ekspozicio, kiun partoprenis Olŝtinaj esperantistoj kaj urbanoj, Elżbieta Frenszkowska prezentis prelegon, ilustritan per bildoj kaj muziko, pri Esperanto, ĝia kreinto Ludoviko Zamenhof kaj nuntempa Esperanto-movado. En la ekspozicio, kiu

daŭris unu monaton, oni povis rigardi beletrajn verkojn en Esperanto, originalajn kaj tradukitajn. Krom tio estis prezentitaj eldonaĵoj popular-sciencaj kaj servantaj por lingvolernado: enciklopedio, vortaroj kaj lernolibroj — ankaŭ la represita eldono de *Unua Libro*. Vizitantoj povis ekkoni Esperanto-gazetararon: *Esperanto*, *Monato*, *La Ondo de Esperanto*, *Juna Amiko*, *Pola Esperantisto*, *Israella Esperantisto*, *Mikrofone* k. a.

La ĉefa punkto de Jubilea Jaro en Olsztyn estos la Olŝtinaj Tagoj de Esperanto de 5a ĝis la 10a de julio. La programo enhavos, interalie, simpozion “Kultura kaj mondkoncepta diverseco de la Esperanta ideo”, prelegojn pri la historio kaj kulturo de Olsztyn kaj de la iama Orienta Prusujo, renkontiĝon kun Roman Dobrzyński kaj ankaŭ vizitadon de la urbo kaj regiono.

Detalajn informojn pri la Olŝtinaj Tagoj oni povas trovi en la retejo:

www.esperantowolsztynie.pl/tl

Elżbieta Frenszkowska



Ekspozicio en Olŝtino (Adam Frenszkowski)

Esperanto-Tagoj kaj vojaĝpraktiko

En la Pollanda urbo Bydgoszcz 19–26 apr 2012 okazis la 37aj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kaj la 41a Sesio de AKB (Klerigejo de AIS en Bydgoszcz) organizitaj okaze de la 666-jariĝo de la urbaj rajtoj de Bydgoszcz kaj de la 125-jariĝo de Esperanto.

20 apr en la Ekonomia Universitato de Bydgoszcz estis enmanigitaj diplomoj al la finintoj de la internacia kurso pri entreprenado kaj pola kulturo. 21–22 apr en la Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo (ICKT) okazis informkunvenoj pri vojaĝoj kaj internaciaj Esperanto-aranĝoj en kelkdek landoj en 2012 kaj 2013.

La Ĝenerala Kunveno de la Internacia Klubo “Esperantotur” pritaksis internacian Esperanto-turismon en 2011/2012, akceptis aktualigitan Turisman Esperanto-Kalendaron por 2012/2013, diskutis festadon de la 125a jubileo de Esperanto, kaj elektis la novan internacian 25-personan Konsilion de “Esperantotur”, denove kun Andrzej Grzębowski kiel prezidanto.

Samtempe en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) okazis sesio de AKB, dum kiu prezentis diversfakajn kursojn de AIS Roman Dobrzyński, Andrzej Grzębowski, Bojdar Leonov, Gerard Tobias, Regina Grzębowska kaj Krzysztof Śliwinski.

En la Muzeo de Diplomatio de la Universitato Kazimiro la Granda prof. Adam Sudoł gvidis internacian seminarion pri diplomatio kaj prof. Aleksandra Kowalczyk — seminarion bakalaŭromagistran de AIS. Zsófia Kóródy prezentis KER-ekzamenojn. Ŝi kaj prof. Iлона Koutny el Universitato Adam Mickiewicz en Poznań akceptis ekzamenon B1, al kiu venis ankaŭ du hispanaj studentoj staĝantaj en Herzberg. Okazis ankaŭ ekzamenoj por vojaĝgvidantoj en ISTK.

Valoras aldoni, ke la Esperanto-Tagojn de Bydgoszcz antaŭis vojaĝpraktiko organizita de “Esperantotur” ĉefe por studentoj kaj sciencaj laborantoj de la Ŝtata Universitato en Uralsk (Kazaĥstano). La 38-personan Kazaĥstanan grupon organizis Mairaŝ Baradossova, kiu havas bonajn spertojn en interuniversitata kunlaboro. La vojaĝpraktiko okazis laŭ la itinero Bydgoszcz-Berlino-Luksemburgo-Parizo-Ostendo-Antverpeno-Bruselo-Roterdamo-Amsterdamo-Hamburgo-Bydgoszcz, gvidis ĝin en Esperanto Andreo Grzębowski kaj akceptis en Belgio Marc Cuffez.

Andrzej Grzębowski

KER: Rekorda tutmonda sesio

La 9an de junio 2012 okazos Tutmonda Skriba Ekzamensio, kiun Katalin Kováts, en la nomo de la Ekzamenkomisiono de UEA, lanĉis kaj organizas tra la tuta mondo.

Danke al vasta informado kaj kampanjo tra retlistoj kaj la paĝaro Edukado.net kolektiĝis granda kvanto de kandidatoj. La eksterordinaran ekzamen>tagon — kiam en du etapoj, en la sama tempo skribos sian teston en 29 urboj de 17 landoj 380 kandidatoj — gvidos ĉ. 50 personoj, speciale trejnitaj lokaj organizantoj. La ekzamenojn en pluraj lokoj patronos ankaŭ neesperantistaj funkcianoj de klerigaj institutoj (direktoroj de kulturcentroj, estroj de lingvistikaj katedroj ktp.) kaj sekvas lokaj amas-komunikiloj, kio donas bonan eblon por informado pri la Esperanto-movado kaj pri ties “seriozeco”.

La ekzamenoblo la plej grandan intereson vekis en Francio, kie en naŭ urboj (Arras, Avinjono, Clermont-Ferrand, Fontaine-Grenoble, Liono, Limoĝo, Parizo, La Roche-sur-Yon kaj Tuluzo) entute 125 francaj kandidatoj ekzamenigis, kaj tiel Francio duobligos la magian ciferon, ĉar jam estas 125 francoj, kiuj trapasis la KER-ekzamenon.

La plej multnombra kandidataro (42) kunvenos en la Meksika urbo Tecamac. Menciindas ankaŭ la aktiva partopreno de ruslandanoj, kiuj en du urboj — Moskvo (34) kaj Jekaterinburgo (22) — entute kun 56 personoj partoprenos la eventon. En Moskvo aliĝis al la sesio plej multe da personoj por la nivelo C1, kaj tial la estraro de UEA decidis subvencii okazigon de parola ekzamensio, kiucele Katalin Kováts kaj Renato Corsetti en decembro vojaĝos al la Ruslanda ĉefurbo.

Kun la trapasintoj de la rekorda ekzamentago la kvanto de KER-diplomitoj en julio tre verŝajne atingos 940–950 homojn.

Kvankam en tiu maniero nur unu parton de la ekzameno eblos trapasigi (ĉar por la parola parto necesas alvojaĝigi du akreditigitajn komisionanojn) la eblo mezuriĝi kaj akiri ŝtate rekonatan lingvoatestilon, eldonitan de la prestiĝa hungara lingvoekzamena centro ITK, allogis multajn esperantistojn. Sekve de tio eblos, ke la Ekzamenkomisiono de UEA ankaŭ estontece ripetos la Mondan Ekzamentagon kaj plivastigos la eblojn de kompletigaj parolaj ekzamensioj.

Katalin Kováts



Kopenhago 2011: Petra Smidéliusz (Hungario) kaj Mónica Molnár (Svislando) ĉe la KER-ekzamena tablo en la Movada Foiro (Foto el Edukado.net)

La 35an fojon en Skokovy

La tradicia 35a printempa seminario en la ĉeĥa urbo Skokovy okazis 16–22 apr 2012 kun trideko da partoprenantoj. Niaj “lernantoj” estis tiel diligentaj, ke ili petis lecionon eĉ antaŭ vespermanĝo.

Petro Chrdle marde prelegis pri Japanio en la domo de maljunuloj. Antaŭ tio ni promenis tra la urbo, kie estas nova instrua vojeto kun kolonetoj, kiuj parolas pri vidindaĵoj kaj historio ĉeĥe, angle kaj germane. Nia rondeto sukcesis krei Esperanto-flugfolion pri la instrua vojeto. Vespere okazis interesa debato pri gramatiko, instigita de Viktor Dvořák, poste Petr Diblík prezentis kreon de mozaiko per propra metodo. En merkredo akceptis plurajn partoprenantojn la urbestro de Mnichovo Hradišti. Vesperan prelegon nun en Esperanto realigis Petro Chrdle. Ĵaŭde sekvis literatura vespero — danke al Mírek Smyčka ni spektis filmon pri Eli Urbanová.

Vendrede antaŭtagmeze ni partoprenis prelegon pere de materialo, sendita de Pavla Dvořáková, pri komputado kaj elektronika tradukado de Google. Vespere ni spektis filmon pri putetoj en Vysočina, lernis kun Mírek Smyčka la Esperantan tradukon de la himno de Ĉeĥio, kaj kantis Esperantajn kantojn laŭ vortoj projekciitaj sur la muron. En nia tombolo ĉiu lotbileto gajnis premion. Sabate tagmeze Jan Pospíšil montris siajn fotojn kaj filmetojn el la brazila Bona Espero kaj la filmon de Roman Dobrzyński pri la “Lernejo en bieno”.

Ni ankaŭ amuzis nin per naciaj kantoj kaj rakontado. Lertaj, diligentaj partoprenantoj kreis memoraĵojn el bidoj kaj papero kun Eva Pánková kaj vaksajn fantaziajn bildetojn kun Majka Kračnarová. Ĉiumatene okazis gimnastiko, kiun Blanka Hužerová riĉigis per jogaj ekzercoj.

La venonta seminario en Skokovy komenciĝos 8 okt 2012. Jam nun vi povas aliĝi.

Jindřiška Drahotová

La britaj esperantistoj intencas okazigi kunvenon en la sino mem de la Brita parlamento Westminster, la tagon de la 125a naskiĝdatreveno de la apero de la Unua Libro por prezenti Esperanton al ĵurnalistoj.

Esperanto Day



26th July 2012

Unufraze

★ La brita revuo *The Economist* demandis en sia retejo, kiu fremdlingvo estas la plej utila por britoj; el pli ol 11 mil respondoj rezultis, ke je la unua loko estas Eo kun 26% de la voĉoj, sekvas la brazila portugala (16%), la hispana k la franca (po 14%), la ĉina (12%), la latina (5%) k. a. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 18 apr Brazilaj parlamentanoj analizis la projekton de leĝo pri instruado de Eo en mezlernejoj; la raportisto de la komisiono pri edukado k plejparto de la deputitoj emas aprobi ĝin. (Emilio Cid)

★ Giorgio Silfer, kiel delegito de la Kultura centro E-ista (Svislando), 18-20 apr partoprenis en la aprila konferenco de ALTE (Asocio de LingvoTestistoj en Eŭropo) en Lisbono. (HeKo)

★ E-istoj el Ĉinio, Koreio k Nepalo 18 apr partoprenis en la Unua Internacia Festivalo de la 15a Mezlernejo en Zaozhuang (orienta Ĉinio) per salutparoloj, leciono de Eo k arta programero. (ĈIIC)

★ Okaze de la unuamaja festo ASELT (Asocio Sennacieca de E-Laboristoj en Togolando) okazigis en Lomeo diskutrondon pri sindikatoj k laborrajtoj, prezentadon de Eo por publiko, futbalan matĉon, festan bankedon k marbordan promenon. (Didier Apelete Agbolo)

★ 9 maj grupeto da e-istoj de Kalio (Kolombio) en la lernejo Sankta Librada instruis Eon al entute 58 geknaboj.

★ 23 apr E-Asocio de Rumanio, kunlabore kun la Distrikta Konsilio, malfermis en Timișoara pentraj-ekspozicion de la korea e-isto Ho Song, kiu dum la malfermo parolis Ee k Maria Butan rumanigis por la ĉeestantoj. (Landa Agado)

★ 16 apr en Loklo (Svislando) okazis la unua sesio de la Senato de la Ea Civito, sub la prezido de la novelektita Konsulo, Marie-France Conde Rey, kiu daŭre prezidas ankaŭ la Feminisman E-Movadon. (HeKo)

★ Unu monaton post la demisio de la kasisto, la estraro de TEJO perdis plian membron — demisiis la ĝenerala sekretario Paulína Kožuchová, kies oficon provizore okupos Paweł Fischer-Kotowski. (Libera Folio)

★ La brazila e-isto Flavio Rebelo, kies retprojektoj Ĝangalo k ITV fiaskis antaŭ kelkaj jaroj, post du monatoj da funkciado de sia nova projekto Nunonia 23 apr 2012 fermis ĝin pro tio, ke Cândido Ruiz subite forlasis sian redaktoran postenon en Nunonia. (La Balta Ondo)



LF en Sankt-Peterburgo

La sesa Lingva Festivalo okazinta la 22an de aprilo en la Ruslanda Sankt-Peterburgo allogis ĉ. 250 partoprenantojn al la nova ejo, granda teknika universitato ITMO. Ĉe la universitato

Sargylaana Sandaar prezentas la jakutan lingvon en la Sankt-Peterburga Lingva Festivalo. (Fotis Sergej Andrejsons)

funkcias studenta fremdlingva klubo, kiu afable kunorganizis la eventon helpante la esperantistajn aktivulojn.

Entute 29 lingvoj estis prezentitaj, kaj la du prezentoj de Esperanto logis plenan ĉambron. Inter la novaĵoj de la ĉi-jara festivalo estis plilongigo de la prezentoj ĝis 50 minutoj, novaj prezentitaj lingvoj (la islanda, la grenlanda, la eŭska). Plej furoris la *Lingvokonzerto*, en kiu lingvisto kaj kantistino Maria Konoŝenko kantis en ses lingvoj kaj komentis ilian fonologian strukturon.

Laŭ la enketado, publiko de la festivalo restis tre kontenta kaj planas partopreni la eventon denove, sekvaprintempe. Kelkaj peterburganoj verŝajne veturos aŭtune al la najbara urbo Velikij Novgorod por partopreni tie la lingvan festivalon, kiu estas planata por la sepa de oktobro.

Vjaĉeslav Ivanov

Grejzono: unu monato en Esperantujo

La Esperanto-Kulturdomo en la kastelo Grejzono (Grésillon) proponas restadojn ekde la 21a de julio ĝis la 20a de aŭgusto 2012 dum kvar tutsemajnaj Esperantorenkontiĝoj. La programo enhavas Esperanto-kursojn en du aŭ tri gradoj kaj aliajn aktivajojn: prelegoj, kulturo kaj arto (teatro, kantado, pentrado, dancado, poezio, filmoj), atelieroj (libro-bindado, masaĝo, astronomio...), sporto (tablotenis, flugpilko...), ludoj (societaj tabloludoj, ŝako...), turisma malkovro de la urbo Baugé kaj ĝia regiono, glob-ludo "Boule de fort", vizitado de reĝaj kasteloj ĉe Luaro...

21–28 jul 2012. Art-amatora semajno. Por ŝatantoj de teatro, dancado, kantado kaj muziko, bindado kaj korpomovoj; por hobiaj artistoj.

Instruantoj de Esperanto: Jean-Luc Kristos, Nina Korĵenevskaja.

Aktivajoj: Tajĝiĉuano; korpa ekzercado; bindado de libroj; teatro, mallongaj skeĉoj; kantu ni francajn popkantojn; dancu ni linidancojn.

28 jul – 4 aŭg 2012. Alternativa semajno kun verd-politika seminario. Por vegetaranoj, verduloj kaj piratoj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, migrantoj kaj biciklantoj, naturistoj kaj tendumantoj.

Instruantoj de Esperanto: Nina Korĵenevskaja, Jean-Luc Kristos.

Aktivajoj: Ekoturismo bicikle kaj piede; teatraĵoj, skeĉoj; kantu ni kaj dancu ni!

4–11 aŭg 2012. Turisma kultura semajno kun ekskursoj posttagmeze. Por ŝatantoj de: turismo, ekskursoj al reĝaj kasteloj, francaj historio, kulturo kaj lingvo.

Instruantoj de Esperanto: Carlo Bourlot, Razen Manandhar; Lala Ralalarisoo instruos la francan lingvon al esperantistoj.

Aktivajoj: Ekskursoj al Luar-kasteloj; prelegoj kun bildoj pri Nepalo; projekcio de mutaj filmoj.

11–20 aŭg 2012. Pupteatra festivaletto kaj gitara improvizado. Por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, eĉ kun beboj; ŝatantoj de marioneta pupteatro kaj lernantoj de gitaro.

Instruantoj de Esperanto: Bert Schumann, Razen Manandhar.

Aktivajoj: Gitara kaj basgitarra kurso; improvizado de muzikaj gamoj; amuzaj aktivajoj diversaj; prelegoj kun bildoj pri Nepalo; farado de man- kaj bastonpupoj; kiel ludi per manpupoj; tri pupteatraj spektakloj kun Christoph kaj Ines Frank.

✉ Château de Grésillon, 49150 Saint Martin d'Arcé, France

☎ +33 (0)2 41 89 10 34

✉ kastelo@gresillon.org

<http://gresillon.org>

Nova vento en Bruselo

de Dafydd ab Iago

Nekredeble rapide oni forgesas malnovajn politikistojn en Bruselo. Dum la lastaj kvin jaroj Nicolas Sarkozy aperis kiel nova vento, pozitive kaj negative. La eksa prezidento de Francio gajnis — certe ne tute laŭmerite — malbonan reputacion, pro siaj troigoj kaj daŭra energio, pro la peno esti iu kiu volis decidi ĉion, ĉie kaj preskaŭ ĉiam.

En urbo tre diplomatia kiel Bruselo, la ĉefurbo de Eŭropo, oni volonte forgesas iun tiel. Ankaŭ diplomattoj de la baldaŭ 28-ŝtata Eŭropa Unio (EU) post lia forigo el la franca kaj Eŭropa scenejoj, pretegis forgesi la maltrankviligan Sarkozy, kaj ili volonte bonvenigis la seriozan homon, kia estas François Hollande, la nova prezidento de Francio.

Tamen la rilato inter Hollande kaj la germana kanceliero Angela Merkel unue ŝajnis fonto de zorgo. Pro siaj grandecoj, ekonomiaj kaj politikaj fortoj, Francio kaj Germanio havas esencan gravecon por la estonteco de Eŭropo. Dum la lastaj jaroj, la politika koncepto “Merkozy” (Merkel + Sarkozy) estis grava en Bruselo. Se Francio kaj Germanio volas aŭ ne volas ion, tiam aliaj landoj apenaŭ povas eviti ilian decidon.

La ege proksima kunlaboro de Sarkozy kun kanceliero Merkel estis precipe grava en la periodo de la ekonomia kaj financa krizo. Tio eĉ puŝis Merkel-on al grava eraro: ŝi transpaŝis la limon de deco pro sia — tamen diplomatia — apogo de Sarkozy kontraŭ Hollande dum la ĵusa elektokampanjo en Francio.

Sed nun ŝajnas, ke la nova koncepto “Merollande” rapide gajnas terenon. La rilato ne estos la sama. Sarkozy estis, tute fizika persono, ofte kisante kaj brakumante la timidajn kaj nefizikan Merkel.

Komence la germanaj diplomattoj provis klarigi al proksimuloj de Sarkozy, ke la puritana Merkel — ŝi ja estas filino de evangelia pastro — ne ŝatas tro multe tuŝi kaj esti tuŝata. Sed tiuj atentigoj ne alvenis al Sarkozy, aŭ li ne povis fari alie kiel tuŝi, brakumi kaj eĉ kisi por montri varman bonvenigon. Probable Merkel iom post iom eĉ alkutimiĝis al la tro sudeca amikeco de Sarkozy.



La celo de la unua oficiala vizito de François Hollande estis la najbara Germanio.

Ne tia estas la nova prezidento Hollande. Li preferas manpremon al kisoj kaj brakumoj. Sed, se temas pri rilatoj kun Germanio, li ne havas elekton. Li devas tre proksime kunlabori kun Merkel por respondi al la gravegaj defioj, kiujn frontas Eŭropo kaj ties komuna mono — eŭro.

Estas ja bone senti novan venton de Parizo. Hollande estas viro kun multaj praktikaj ideoj. Unu el la unuaj decidoj de Hollande estis tranĉi je 30% la salajrojn de ministroj kaj de si mem kiel prezidento. Tiuj proponoj, kompreneble, ne estas ŝatitaj de la plej malmulto de politikistoj en Bruselo.

Hollande jam influas la prezidanton de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso. La lasta promesas planon por puŝi “ekonomian kreskon”, kvazaŭ la ideo venas nur de lia persono. Kompreneble, Barroso ne malkaŝas kiom da mono estos disponebla por promocii ekonomian kreskon en Eŭropo.

La teorio de Everett Rogers

En *La Ondo de Esperanto* №211 Dennis Keefe prezentas interesan teorion pri la akceptado de novaj ideoj. Oni diras, ke nenio estas pli utila por la praktiko ol bona teorio. Certe jes, sed la teorio de Rogers ne estas tute nova por ni, ĉar ni jam agadas en la senco de la menciitaj kriterioj. Ankaŭ nia lingvo aŭ produkto plenumas la cititajn kondiĉojn.

Jen koncize la situacio.

1. **Alta videbleco.** Esperanto kaj la simboloj aperas videble kaj ripete en la varbado. Bona ekzemplo estas la litero **ESPERANTO**, portataj de italaj esperantistoj sur la placo de Petro en Romo. En la publika percepto evidente esperanto ne sufiĉe videblas, tiel ke multaj homoj opinias, ke esperanto formortis.

2. **Malalta komplikeco.** Esperanto estas modelo por malalta komplikeco. La lingvo estas simpla, logika kaj relative facile lernebla. Hodiaŭ ni scias, ke ne estas saĝe, tro akcenti la facilecon de la lingvo.

3. **Relativa avantaĝo.** Esperanto peras personajn avan-

taĝojn kaj alportus enormajn ekonomiajn ŝparojn. Vidu la studon de prof. Grin. Ni devus substreki multe pli la ekonomian flankon, ĉar tio tuŝas ĉies monujon.

4. **Facila ekprovebleco.** Eblas ekprovi esperanton facile kaj multaj agas tiel, invitante al provleciono aŭ al enkonduko. En interreto multaj eblecoj estas je dispono.

La aŭtoro rekomendas koncentriĝi al la grupo A, tiuj 2,5% de la homoj, kiuj pretas akcepti novajn ideojn. La problemo estas, ke oni ne sufiĉe konas tiun segmenton. Ĝi ne estas bone rekonebla kaj do ne rekte alparolebla.

Cetero mi opinias, ke ni devus cerbumi pri la strategio por disvastigi esperanton en la 21-a jarcento. La koncepto de lingva demokratio certe validas plu, sed ni devus trovi lokon apud la angla, kiu fariĝis la internacia helplingvo. Esperanto kiel persona internacia komunikilo de homoj al homoj kontraste al la angla de organizoj al organizoj. La ŝancoj de esperanto kiel alternativa internacia helplingvo ekzistas. Necesas difini tiun rolon aŭ niĉon kaj repoziciigi esperanton en la lingvopolitiko.

Bruno Graf



Komputila klavaro (keyboard)

- 01 eniga klavo (enter)
- 02 majuskliga klavo (shift)
- 03 spacostango (space bar)
- 04 majuskla baskulo (caps lock)
- 05 funkcia klavo (function key)
- 06 stirklavo (control key)
- 07 opcia klavo (option key)
- 08 komanda klavo (command key)
- 09 foriga klavo (delete button)
- 10 eskapa klavo / ordon-nuliga klavo (escape key)



Lasera presilo/printilo

Nuntempa Esperanto: pri komputilaj vortoj

“En Esperanto eblas ĉion esprimi”. Kiam mi en 2007 laboris kiel tradukisto de komputilaj programoj, mi ofte demandis min, ĉu tio veras ankaŭ por tutnovaj teknikaj vortoj. Kaj mi efektive ilin trovis. Plejofte ne en PIV, nek en tradukvortaroj. Sed en *Reta Vortaro*, *Komputada Leksikono* kaj en traduklistoj de skipoj kiuj tradukas komputilajn programojn en Esperanton.

Kiam mi esploris la aferon de pli proksime, mi iom seniluziiĝis. Daŭris longe por trovi bonajn tradukojn kaj ne ĉiam proponintoj de vortoj konsentis. Novaj komputilistoj-esperantistoj eklernis la lingvon kaj tuj ektradukis programojn, ĉefe malfermitkodajn. Ĉar ili ne trovis komputilajn vortojn en vortaroj, ofte ili mem inventis “ion strangan”, kvankam tamen foje jam dum jardeko cirkulis tute akceptebla vorto. Aperis neologismoj abunde kaj en malsamaj programoj por samaj aferoj aperis malsamaj vortoj. Terure!

Ne nur komputilistoj uzis kaj plu-uzadas komputilajn vortojn. Ekde kiam aperis la Interreto, nia socio rapide ŝanĝiĝis kaj en la gazetaro kaj dum prelegoj oni ekparolis pri Facebook, Vikipedio, retpoŝto k.s. Bedaŭrinde pli kaj pli da “strangaj vortoj” estis uzataj. Kaj neniu korektis, ĉar eĉ spertaj esperantistoj la vortojn ne konis. Nek trovis en la vortaroj kiujn ili kunportis...

En majo 2007 mi ĉeestis laborsemajnfinon en Cambridge por traduki OpenOffice.org al Esperanto. Okazis tie altkvalitaj diskutoj; evidentiĝis ke dum pluraj jaroj kelkaj homoj laboris jam pri la projekto. Sed neniu notis la konkludojn! En tiu momento mi decidis fari la projekton *Komputeko*: prikomputila terminokolekto. Por ke la kono ne perdiĝu; por ke multaj esperantistoj povu profiti de nia laboro.

Mi kreis retejon www.komputeko.net. En ĝi mi publikigis kelkmil vortojn kun tradukoj al pluraj lingvoj. En mia laborejo mi jam havis liston plurlingvan; ankaŭ en naciaj lingvoj ne ĉiam facilas trovi bonan tradukon por usonangla termino. Poste mi aldonis multajn vortojn kaj poluris la listojn. Mi provlegis tradukojn de programoj, komparis kaj diskutis. Iom post iom la kvalito kreskis (ĉefe de la parto angla-Esperanto) kaj pli da homoj ekuzis la retejon. Mi faris listojn de plej oftaj vortoj kaj tiujn sendis al vortaristoj por ke ili konsideru aldoni ilin al la venonta eldono de sia vortaro.

Kelkaj homoj demandis min pri papera eldono de la *Komputeko*. Papera eldono de prikomputila vortaro en Esperanto? Al mi ŝajnis esti stranga ideo. Sed pli kaj pli da homoj insistis. Esperantistoj ŝatas vortarojn kaj gravas havi la eblecon ilin

palpi. Finfine mi konsentis pri tio, ĉefe post kiam iu al mi donis la argumenton ke “prikomputila terminaro estas la plej bona privilegio ke Esperanto estas moderna lingvo; estas bonega kaj tre interesa varbilo!”

Bone, do ni kreu paperan version. Ĉu 100 ekzempleroj? Eldonisto Peter Baláž insistis pri 500 (!) ekzempleroj kaj ni presis la unuan eldonon en majo 2008. Ene de duonjaro ĝi elĉerpiĝis. Ni ne volis tuj represi ĝin kaj finfine atendis kvar jarojn antaŭ ol krei duan eldonon.

Ne temas pri simpla represo; multaj homoj sendis al mi korektojn kaj sugestojn kiujn mi traktis. Estas kelkaj kromaj bildoj kaj klarigoj, ĉapitroj pri ĉapelitaj literoj, ekzemplaj frazoj el Vikipedio kaj mi aldonis kvinlingvan liston (Esperanto-angla-franca-nederlanda-ĉeĥa) de 400 ofte uzataj prikomputilaj vortoj. La nova eldono de *Komputeko* estas interalie havebla en la libroservoj de UEA kaj FEL. Se vi havas komentojn aŭ volas iĝi pluvendisto de la libretoj, vi povas kontakti E@I pere de la adreso info@komputeko.net

Yves Nevelsteen

Poezia teksto, ne politologia artikolo

La komento de Wolfgang Kirschstein (LOdE, 2012, №5, p. 13) aperis sen mia scio kaj konsento kaj redonas ekskluzive la opinion de ties aŭtoro. Al la teksto mem ĝi aldonas absolute nenion.

Laŭ W.K. Grass verkis “poeziaĵo(n) kun rompita(j) linioj” kiu estas “gazeta pamfleto”. Vero estas, ke la teksto de Grass apartenas al la kategorio de politika liriko kun longa tradicio en la germana literaturo (ĝis Walther von der Vogelweide). Kirschstein restas ŝulda la klarigon pri tio, ke “idiota” estas esprimo de aŭtoleco. Kiel multaj aliaj reagintoj li subfalas la eraron konfuzi poezian tekston kun politologia artikolo. Ke Grass pledas por internacia kontrolo de ambaŭ flankoj — la irana kaj la israela — tion W.K. prisilentas. Same ne allaseblas lia substĉituo, ke Grass “ne povis pensi antaŭ ol ŝpruci [= ŝpruciĝi, – R.H.] sian lastan inkon”, metaforo kiu plaĉis eĉ al la larmo-melka Reich-Ranicki...

La reagoj en Israelo kaj Germanujo estis politike motivitaj, provis meti buŝmon al la aŭtoro kaj deturni la atenton de la kritikataj punktoj. La “hipokrito” pri kiu Grass parolis, trovis plian konfirmon.

Reinhard Haupenthal

La 27an de februaro 2012 en Taŝkento forpasis

Jevgenij Sergejeviĉ Perevertajlo (1938–2012)

esperantisto ekde 1957, elstara Uzbekistana esperantisto, brila Esperanto-pedagogo, dojeno de la Centr-azia Esperanto-movado. Li tradukis la romaneton *Timur kaj lia taĉmento* de Arkadij Gajdar (HEA, 1982), publikigis la 11-lingvan Esperanto-kurson en la revuo *Sovetskij Uzbekistan* (1988-1990), verkis kaj eldonis du lernolibrojn de Esperanto.

La 18an de aprilo 2012 en Budapeŝto forpasis

Ottó Haszpra (1928–2012)

emerita profesoro de la Teknika Universitato de Budapeŝto, membro de la Hungara Akademio de Sciencoj (2004). Esperantisto ekde 1958, dum pluraj jaroj estrarano kaj vicprezidanto de HEA, estrarano de UEA (1986-1989), redaktoro de *Sciencaj komunikaĵoj* (1974-1979), gvidanto de Scienca Eldona Centro de UEA (1981-1985), aŭtoro de multaj fakaj studoj, membro de la Akademio de Esperanto, Honora Membro de UEA.

Nikolajs Kurzens

Ĉiuj recenzoj, paroloj, eseoj pri Kurzens mencias la Kaloĉajajn vortojn: “Kantisto de vivsopiro, de malkontento, de amara spito kontraŭ malvastaj horizontoj. Li havas preskaŭ solan temon: la senpovon de junulo malsata je l’ vivo. Sed sur tiu sola temo li faras variaĵojn konsternante riĉajn.” Tiu estas la prezento de la latvo Kurzens (Origine: Nikolajs Ķūrzens, 1910–1959) en *Dekdu poetoj*, aperinta ĉe eldonejo *Literatura Mondo* en 1934. Temis pri tre talenta junulo, filo de gimnazia instruisto pri matematiko, junulo aktiva ankaŭ en la movado: apenaŭ pli ol dudekjara li estis redaktoro de *La Ondo de Daugava* (1932–34), vicprezidanto de Latvia Esperanto-Societo, ekde 1933 versoj el lia plumo pluraj en *Literatura Mondo*.

Dudek poemoj en la Kaloĉaja antologio, kvindek naŭ en la persona kolekto *Mia spektro* ampleksanta la periodon 1931–1935 (sed aperinta ĉe *Literatura Mondo* nur en 1938), kiu tamen (bedaŭrinde!) forsarkas tri el la antaŭaj. La dua eldono, en 1985, kolektas la poemojn de la antaŭa eldono, la tradukojn de Kurzens el la latva kaj la tradukojn fare de Elvira Lippe el la latvaj poemoj de Kurzens. Posta eldono ĉe *Sezonoj* (1987) kun titolo *El “Mia spektro”* reapergas, en tre modesta mimeografiita vesto, nur liajn originalajn esperantajn poemojn de la eldono de 1938, kun enkonduko de William Auld kaj biografiaj notoj de Mirdza Burgmeister. Nenio alia de li.

La vivdestino ne estis tro favora: el sia naskiĝurbo Alukse ne li venis al Rigo, kie li lernis esperanton kiel mezlernejo kaj kie li diplomiĝis; ŝtatoficisto post abiturientiĝo, li studis ekonomikon, la milita ŝtormo kun okupado de Latvio fare de Sovetio, poste Germanio, poste denove Sovetio, lin portis al Germanio kaj nur en 1945 li revenis al sia lando, sed pro personekulto estis deportita al norda Ruslando kie li restis dum kelke da jaroj. La movado en Latvio estis rekonstruita en 1957, sed li ne plu partoprenis ĝin. Lia humoro, jam nigra pli frue, lin kondukis al deprimiĝo, kaj en hotela ĉambro la 3an de aŭgusto 1959 li mortigis sin. En sia adiaŭa letero al la edzino Anna li skribas: “Mi ne plu havas forton kaj ĉefe, jam delonge havas nenian sencon, ankoraŭ kaj ankoraŭ daŭrigi tiun ne esprimeble stultan per nenio pravigeblan, jam delonge ĝis ekstremo tedintan komedion, kiun ne sciate pro kio, oni kutimas nomi per nobla kaj sonora vorto — la VIVO.”

Se iom supraĵe resumi la Kaloĉajan prezenton, la poezio de Kurzens estas unuteme pesimisma. Pesimismo de dudekjarulo, kiu ne malaperas kun la paso de la jaroj. Tamen tiu unutemeco tiom nigra ne estas prikonsentebla. Alternas pensoj ja nigraj pri morto kaj pri senceleco de la vivo kun aliaj tamen tute alispiraj, ĝojaj, plezurcelaj. Penso pri rapidritma vivo sencela estas jam de 1933:

*Mi rapidas tra la vivo, mi ne haltas dum la iro —
ja nenio plu min tenas, ne katenas min sopiro.
Sub la flekse ŝova ŝuo de fokstrota pulsa ĝuo
fordegelu miaj tagoj en ebrio kaj delir’.*

*Haku gaje la minutojn ĝesa¹ ritmo brutambura,
horojn portu for al foroj violona fajfo kura,
en murmuro monotona de la voĉo saksofona
pasu mia viv’ kaj ĉesu — sen postlas’ de ia spur’.*

Oni trovas aliteraciojn kaj ritmon kiuj memorigas pri

Hohlov, kaj tiutempa malmultlinia recenzo de K. R. C. Sturmer en *The British Esperantist* (1939) trovas tion paŭsaĵo, ne rimarkante la originalecon. Aparte atentinda, kaj atentata de Auld, la “abortita” rimo per la lastaversa elizio, stilapartaĵo de Kurzens, troviĝanta ankaŭ en aliaj liaj poemoj.

Tradukoj el la latva lin anoncas en *Literatura Mondo*

(majo 1933), kaj la “Redakcia poŝto” samnumera lin kuraĝigas: “Viaj tradukoj [...] montras traduk-kapablon, kiu, se vi pli vaste vin dediĉos al la interpreto de poezio, vin certe levos inter niajn plej bonajn poemtradukistojn (ili ne estas tro multaj).” Sekvas pliaj tradukoj; dudek kvar poeziaĵoj tradukitaj aperas en *Literatura Mondo*, okt. 1934, la latva numero. Ankaŭ ĉe traduko Kurzens majstras ĉe aliteracioj; jen ekzemplo en *Momento de ĝojo* de V. Pludonis: *Verdherbajn kampojn mi travagas sola. / Varmspire min karesas la somer’.* / *Ĉiela bluo fluas super ter’.* / *En ravaj revoj dronas mi, senvola. / Kontestas mi. En kor’ deziroj ĉesas. / Anim’ fandiĝas kun la univers’.* / *Kaj ĉio, ĉio iĝas bela vers’.* / *Por esti ĝoja, kiom nur necesas.*

Originalaĵoj debutas en la oktobra numero de 1933. Tute gajaj, kongruaj kun la junula aĝo:

*Hodiaŭ min regas ekscito,
hodiaŭ mi estas ne mi;
lavange la sango min pelas,
la sentoj ventege ribelas,
kaj regas min stranga ekscito:
hodiaŭ mi pensas pri vi.*

Ne malofitas la instigo al senbrida ĝuado, neglekte pri fino: *Kial ne ĵetiĝi haste / En la kirlon de diboĉo, / Kial ne mankapti draste / Kaj ne trinki ĝojo-vinon? / Ja la fino / Venos mem.*

Amon li ne forgesas: en *Al amikino iama* li preskaŭ drolotas malsane palan amikino: *foru la malsan’ / Ke ree floru ĝoj’ sur via vojo.*

Ankaŭ William Auld, en la enkonduko al *El “Mia spektro”*, evidentigas unutemecon: *la senespera, senkolora senceleco de lia vivo.* La ripetado de koncepto “sen” bone portretas la maltrafitajn aspirojn de la poeto. Tamen de tempo al tempo li ŝajnas trafi al feliĉo, kiel en *Subita ĝojego*:

*Hodiaŭ radias la mondo junbrila
en fluo de l’ bluo serena.
Mi volus forpaŝi kun “vivu!” jubila,
kun kapo senĉapa, kun koro facila
kantante, laŭ vojo sunplena.*

Kvankam lia produktado ampleksas entute kvin jarojn, kaj la originalaj poemoj estas entute sesdek du, do en ĝenerala literaturhistorio li estus menciinda per piednoto, senmortajn spurojn li ja lasis. La *Esperanta antologio* transdonis al la populara kulturo dek kvar el la poemoj de Kurzens. Certe restas en la memoro la versoj de la *Aŭtuna elegio* (majo 1934): *Hieraŭ pluvis, kaj hodiaŭ pluvas / kaj morgaŭ same, lace glitos gutoj; / kaj same, lace iros la minutoj / de mia viv’, sencela kaj enua.*

Kaj same en *Ĉu tio do — la vivo?* aŭdiĝas, kaj plurestos en la memoro, la krio:

Ĉu vere nur por nin al tombo treni, / ĉu vere nur por morti ni naskiĝis? / Ĉu tio do — la viv’? Ne, ne! Neeble! / Ankoraŭ devas, devas io veni!

Carlo Minnaja

¹ Nun “ĵaza”

Eksavangarda klasikajo

Ionesco, Eugène. *La leciono*: Komika dramo / Tradukis el la franca Armela LeQuint, Ĵak Le Puil. — Thaumiers: LKK, [2010]. — 40 p.

Iam *La Leciono* estis avangarda dramo, nuntempe ĝi jam estas klasikaĵo, eĉ sukcesa, ĉar dum 55 jaroj ĝin oni ludas sur la scenejo de la eta “Teatro de la Huchette” en Parizo. La verkisto notis pri tio: “Granda sukceso en malgranda teatro estas pli bona ol malgranda sukceso en granda teatro”.

Spektantoj do eĉ post tiom da jaroj povas preni ion de tiu leciono.

Nia lecionisto estas la profesoro, *malgranda oldulo kun blanka mentonbarbo*. Li estas unue *ekscese ĝentila, tre timida, voĉo mallaŭta pro timideco, tre deca, tre profesoreca*. *Li daŭre frotas al si la manojn: de tempo al tempo malĉasta brileto en la okuloj, rapide bridita*. Nova lernantino anoncas sin, *en griza kitelo, blanka kolumeto, tekono sub la brako*. La lernantino *soifas kleriĝi* — ankaŭ ŝiaj gepatroj *opinias, ke simpla, ĝenerala kulturo, eĉ se ĝi estas solida, ne plu sufiĉas niaepoke*. La profesoro konfirmas tion: *Hodiaŭa vivo iĝis tre kompleksa kaj ampleksa scio estas la vojo al sukceso*.

La profesoro ekzamenas unue la scion de la lernantino en la geografia fako (*Parizo estas la ĉefurbo de...?*) kaj gratulas ŝin abunde, ĉar ŝi diras la ĝustan respondon: *Vi konas vian landan geografion ĝis la pinto de viaj ungoj, tutparkere, ĉu ne?*

La servistino eniras kaj klopodas bridi la entuziasmon de la profesoro, ŝi konsilas al li kvietiĝi: *Vi pli bone farus ne komenci per aritmetiko kun la fraŭlino. Aritmetiko lacigas, eĉ nervozigas*.

La profesoro ne aŭskultas, sed daŭrigas la ekzamenon (*Kiom estas unu plus unu?*) kaj plene kontentas pri la adiciaj kapabloj de la lernantino: *Vi estas grandioza. Vi estas superba. Mi varme gratulas vin, Fraŭlino*.

Sed tuj montriĝas, ke la subtrahaj kapabloj de la fraŭlino estas tre nekoheraj. Vane la profesoro klopodas kleriĝi ŝin: *Ni havas la nombron kvar kaj la nombron tri, kun por ĉiu nombro egala kvanto da unuoj; kiu nombro estas la pli granda, la pli eta nombro aŭ la pli granda nombro?* Pli kaj pli strangiĝas liaj klopodoj: *Vi havas du orelojn, mi prenas unu, mi manĝas unu, kiom da restas al vi?* Finfine la lernantino koncedas, ke ŝi ne povis fidi sian rezonadon. Tial ŝi parkere lernis ĉiujn eblan rezultojn de ĉiuj eblas multiplikoj.

Konstatinte ke la lernantino estas *tiel malmulte progresinta pri specialaj matematikoj* la profesoro ŝanĝas la fakon. Nun temas *pri la elementoj de lingvistiko kaj de kompara filologio*. Denove la servistino eniras kaj provas nepre malhelpi tiun parton de la leciono: *la filologio kondukas al katastrofoj ...*

La profesoro jam komplete perdis sian antaŭan timidecon kaj plenaŭtoritate li eksplikas sian sensencan kurson pri la *lingvoj novhispanaj*. La lernantino fariĝas pli kaj pli malkomforta, ŝi havas dentdolorojn kaj vane ŝi provas eviti la profesoron.

Finfine ŝi submetiĝas al la frenezaj asertoj de la profesoro: *Por ekscii distingi ĉiujn tiujn diversajn lingvojn, mi jam diris*

ke nenio pli bonas ol la praktiko... Por pli bona praktiko li trovas en sia tirkesto tranĉilon: Damaĝe, ke estas nur tiu-ĉi; sed ni provos uzi ĝin por ĉiuj lingvoj!

Kaj per praktiko la profesoro demonstras la frazon: *La tranĉilo mortigas*. — *La leciono estas finita*, jam la kvardeka de tiu tago. La servistino riproĉas la profesoron kaj li klopodas ekatiki ŝin, sed du vangofrapoj sufiĉas por haltigi lin. Ili surmetas brakbendojn, kun insigno, eble la nazia svastiko. Kune ili forigas la korpon de la lernantino. Post nelonge sonoras la pordosonorilo — alvenas la 41a lernantino.

Evidente eblas kompreni tiun tekston sur diversaj niveloj. En la dramo mem Ionesco aludas al la temo. La dogmo de la profesoro estas: *Nepras ne nur integri, sed ankaŭ malintegri. Tia estas la vivo. Tia la filozofio. Tia la scienco*. Ionesco demonstras la malintegran povon de ideologioj — tio sufiĉu pri la temo.

Traduki Ionesco'n estas defio, ĉar speciale en la frenezaj elŝutoj pri *lingvistika filologio* estas aludoj, kiuj nur plene funkcias en la franca. Ekzemple Ionesco ludas kun la sonoj *ku to*, kio estas la normala vorto por “tranĉilo” (couteau), sed kio ankaŭ sonas kiel “cou tôt” (gorĝo baldaŭ). Tiam la tradukanto devas rezigni. Sed en aliaj fojoj — daŭre dum la filologia sesio — Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil traktis la tekston iom tro libere. Ne eblas meti piednotojn en la teatro, do necesas trovi aliajn vortludojn kaj ŝercojn, sed la traduko devas — bedaŭrinde — esti pli pala ol la originalo. Sed la traduko funkcias sufiĉe bone sur scenejo kaj tio estas la plej grava. Jen ĝenerale bone legebla traduko de grava teatraĵo de la 20a jarcento.

Ĝi havu multe da legantoj kaj elĉerpiĝu baldaŭ.

Wolfgang Kirschstein



ARKONES

Poznań (Pollando), 21–23 sep 2011

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando

iesperanto@versatel.nl

www.iei.nl

vendas proprajn eldonaĵojn, interalie:

Baza Cseh-kurso (Cseh, 1992).....€ 15,-

Esprimoj de sento (Privat, 1995)... € 18,-

Konversacia vortaro (Cseh, 2010)..€ 13,-

Urug: romano (Haase, 2012).....€ 13,-

kaj aliajn novajn kaj brokantajn librojn.

Por Jorge Camacho la 125a datreveno de Esperanto estas preteksto por listi plurajn aliajn, jen naskiĝ- aŭ mort-datrevenoj, tiuj por ekkonstruo de la Ejfel-turo, aŭ de la domo, kie situas la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Ankaŭ la 20-jariĝo de la ibera grupo ĉeestos tra la ĉi-jaraj BA. Tion certigis en sia prezento la ĉefredo.

Originala prozo malfermas la buntan enhavon de la februara almanako: *La kri' de Mari'* de Ulrich Becker, *Tange* de Miguel Fernández, *La nigrevestitaj virinoj* de Júlia Sigmond, *Kurkulio* de Tim Westover.

La branĉon de originala poezio uverturas *La plenumo* de William Auld (Manuel Pancorbo priskribas la cirkonstancojn de ĝia muzikigo en sia artikolo). Plie, poeziaĵoj de Baldur Ragnarsson, Aleksandro Mitin, Jorge Camacho, Dolores Godoy, Carmel Mallia, Mao Zifu, Gonçalo Neves, Benoît Philippe, Patricia Romero. La teatraĵo *Justa juĝo* de Doron Modan aperas almanake pro ĝia premiiteco en la Belartaj Konkursoj de UEA (2011).

Dekkvino da kontribuajtoj estas eseoj kaj artikoloj. Estu menciataj almenaŭ kelkaj. Jam aperis tekstoj de César Mallorquí, ĉi-foje li donas dek konsilojn al juna verkisto (la lasta tekstas: Estu preta akcepti, ke vi ne estas verkisto). La metiejo de Sten Johansson temas pri *Vidpunkto kaj voĉo en prozo*. La dudekjariĝo de la ibera grupo ricevas la unuajn priajn kontribuojn de Giulio Cappa kaj Baldur Ragnarsson. *La sekreta malsano de la esperanta poezio* de Julius Balbin (1973) ricevas komentojn de Ralph Dumain kaj Ken Miner, Zofia Banet-Fornalowa kontribuas lian biografion. Pliaj personoj ricevas omaĝojn: Bernard Golden, Enrico Dondi, Christa Wolf, Arthur Benton.

La anglalingva romano *A Curable Romantic* [Kuracebla Romantikulo] de Joseph Skibell, en kiu temas, inter alie, pri Zamenhof kaj Esperanto, estas honorita per du recenzoj (Anna Löwenstein kaj Esther Schor). Intervjuo de István Ertl kun la aŭtoro de la romano aperas almanakofine. Inter la aliaj recenzoj en la unua ĉi-jara almanako mi mencias la recenzan eseon de *La silika hakilo* de Jorge Camacho, kiun verkis Nicolino Rossi.

Ĉiuj fotaj ilustraĵoj en la 13a *Boao* rilatas al kosmo.

Halina Gorecka



Pri kio temas en ĉi mondfamiĝinta, Oskar-premiita filmo *The Help* (2011), t. e. *Servistaro* aŭ *Servistinoj*?

Resumo aspektas ne tre originale. Nigrulinoj (nun oni nomus ilin afrikusonanojn), servistinoj en malgranda urbeto, estas ĉiam humiligataj kaj malrespektataj de siaj posedantoj (jes, nome tiel, ĉar oni daŭre transdonas ilin kaj eĉ testamentas). Apartaj necesejoj en domo, malafablaj rimarkoj, malrespekta traktado — ĉio ĉi jam multe videbliĝis en antaŭaj filmoj kaj libroj pri temoj. Ankaŭ pri lukto de humiligataj nigruloj por siaj rajtoj ni multe legis, aŭdis kaj spektis. Do, ĉu laŭvica politik-korekta historio? Ne, la afero estas multe pli komplika.

Ĉio menciita vere okupas gravan lokon en la filmo, sed per tio ĝia enhavo ne tute elĉerpiĝas. La aŭtoro de la samnoma romano Kathryn Stockett kaj la reĝisoro Tate Taylor prenis pli vastan, ĝeneralan vidpunkton al la problemoj kaj analizas stacion kaj konduton de ambaŭ flankoj — blankaj humiligantoj kaj nigraj subprematoj. Kaj tio donas neatenditan rezulton!

Evidentiĝis, ke sklaveco trafis ne nur la servistaron, sed ankaŭ la sinjoraron. Blankuloj estas same malliberigitaj de siaj superstiĉoj, timoj, stereotipoj kaj ne nur rilate al nigraj servistinoj, sed ankaŭ al si mem. Sorto de blanka fraŭlino estas destinita jam ekde la fino de la lernejo. Ŝi devas posteniĝi en iu ne tre komplika, sed ofte vizitata de viroj entreprenoj kaj atendi, ĝis iu fianĉinigos ŝin. Poste ŝi por ĉiam revenas hejmen,

kie pasigas sian tempon en babilado kun amikinoj, ioma prizorgado de la hejmo (plejparton de la laboro plenumas nigraj servistinoj) kaj naskado de geinfanoj, kies edukadon ankaŭ prizorgos nigraj plebaninoj. La socia vivo minimumiĝas ĝis bonfaraj vesperfestenoj, inkluzive de tiuj profite al la Afrikaj infanoj — jes, nigraj, sed tre malproksimaj, do preskaŭ neekzistantaj.

Ili eĉ inter si trovas maloportunajn homojn, ne indajn je amikeco kaj estimo. Ĝojplena, sed naiva blanka junulino, edziniĝinta al enviinda junulo, estas ignorata de loka “dama klubo” malgraŭ sia bonvolemo. Eĉ plej noblaj el blankulinoj estas sklavigitaj de sia ĉirkaŭaĵo. Do la patrino de la ĉefa heroino (Allison Janney) fakte estas devigita elpelita maljunan nigrulinon (Cicely Tyson), kiu edukis ĉiujn ŝiajn infanojn kaj pasigis tutan vivon en ĉi domo — ja tion postulis gastoj, indignaj pro la sendependa konduto de nigrulinon.

La ĉefa heroino de la filmo — blanka junulino (Emma Stone) — havas pli fortan volon kaj deziras alian vivon. Kiun? Ŝajne, unue ŝi mem ne certas pri tio. Ĝenerale ŝi sekvas la komunan vivofluon kaj diferenciĝas nur per siaj pensoj kaj malinklino al rapida edziniĝo kontraŭ iu ajn prezo. Sed kiam ŝi faras sian unuan tute sendependan, malkutiman paŝon kaj komencas skribi vivrakontojn de nigraj servistinoj, ŝi komencas aliĝi, do sendependiĝi. Paŝon post paŝo okazas liberiĝo de ambaŭ — aŭdanto kaj rakontanto.

Libereco estas multtekosta akiraĵo, do kontraŭ ĝi ĉiu pagas altan prezon. Blanka ĵurnalistino perdas sian koramikon, kiu ne sukcesis transpaŝi la limojn de sia mondpercepto. Nigraj servistinoj perdas laboron, unu estas akuzita je ŝtelo, alia foriris de la edzo — ebriulo, kiu ofte batadis ŝin. Sed la celo valoras tion.

Fine de la filmo servistino (Viola Davis), ĵus elpelita kaj akuzita, demandas sian persekutantinon (Bryce Dallas Howard): “Ĉu vi mem ne laciĝis?” Kaj laŭ ties aspekto evidentiĝas jesa respondo. La nigrulino foriras — humiligita, sed libera. La blankulino restas — ekstere venkinta, sed interne tute dispremita de sia sklaveco kaj malamego.

Kaj en la memoro emerĝas malnova devizo: Libereco oni de donas — oni ĝin prenas.

Stanislao Belov

La Verko de la Jaro 2011



Inter la ok poemaroj, kiuj kandidatis por *La Verko de la Jaro 2011*, nur du estis aŭtoritaj de virinoj, ambaŭ el Bulgario. La abonantaro de *Literatura Foiro* per voĉdonado metis ilin sur la unuajn du lokojn, kun diferenco de unu voĉo. La premion *La Verko de la Jaro 2011* gajnis la hajkaro **Kardo sur kasko** de **Ivanička Maĝarova** kun 7 ricevitaj voĉoj, ĝin sekvas alia hajkaro: *Rudimentaj momentoj* de Lilia Nikolova kun 6 voĉoj.

Sekvas en la listo *Esperanta versado* de Jaroslav Krolupper (4 voĉoj), *Epizodoj* de Lode Van de Velde (3 voĉoj), *La fontoj nevideblaj* de Baldur Ragnarsson (2 voĉoj) kaj *La silika hakilo* de Jorge Camacho (1 voĉo). Ne ricevis voĉojn *Orgeno* de Mihail Ŝĉerbiniĉ kaj *Poemoj pri diversaj universoj* de Sébastien Garant.

La premio *La Verko de la Jaro* estas aljuĝata per referendumo de la abonantaro de *Literatura Foiro*, kiu iniciatis la premion en 1975 kaj aljuĝis ĝin ĝis 1986. Sekvis dek-jara paŭzo ĝis la premio reviviĝis en 1997, ekde tiam la premio estas atribuita al poezio en neparnombraj jaroj kaj al prozo en la jaroj parnombraj. Nuntempe la premion administras la Esperanta PEN-Centro.

Listo de la libroj gajnintaj la Premion *La Verko de la Jaro*:

- 1976 *Ĉu vi kuiras ĉine?* de Johán Valano
- 1977 *De tempo al tempo* de Giorgio Silfer
- 1978 *La granda kaldrono* de John Islay Francis
- 1979 *Ĉu li bremsis sufiĉe?* de Johán Valano,
La turoj de l' ĉefurbo de Mauro Nervi
- 1980 *Sur la vivopado* de Nicolino Rossi
- 1981 *La Litomiŝla tombejo* de Karolo Piĉ
- 1982 *Lappar, la antikristo* de Endre Tóth
- 1983 *La blinda birdo* de István Nemere
- 1984 Ne aljuĝita
- 1985 *La monto* de István Nemere
- 1986 *La alta akvo* de István Nemere
- 1997 *El miaj sonoraj soloj* de Miguel Fernández
- 1998 *Durankulak* de Sabira Ståhlberg, *La Tunelo* de Marco Picasso,
Pajleroj kaj stoploj de William Auld, *Tien* de Johán Valano
- 1999 *Karnavale* de Abel Montagut
- 2000 *Neniu ajn papilio* de Trevor Steele
- 2001 *Havenoj* de Mauro Nervi
- 2002 *La fermata konko* de Julian Modest,
Krias la silento de István Nemere, *Tilla* de Spomenka Ŝtimec
- 2003 *Cetercetere* de Jarlo Martelmonto
- 2004 *Memor' mortiga* de Sten Johansson,
Tarokoj kaj epokoj de Christian Deklerck
- 2005 *Ĉiuj dioj estas for. Novjorkaj poemoj* de Ulrich Becker
- 2006 *Hodler en Mostar* de Spomenka Ŝtimec
- 2007 *La lingvo serena* de Baldur Ragnarsson
- 2008 *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* de Manuel de Seabra
- 2009 *Kajto* de Mikaelo Bronŝtejn
- 2010 *Vizaĝoj novelaro* de diversaj aŭtoroj
- 2011 *Kardo sur kasko* de Ivanička Maĝarova

Halina Gorecka

Pro tio, ke la eldonanto kaj la redaktoro de *La Ondo* en junio havos tri-semajnan restadon en sanatorio, la julia *Ondo* aperos meze de julio.

Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako, 2012/13; Bulteno de Esperantista Klubo en Praha, 2012/1; Esperanta Finnlando, 2012/2; Esperanto aktuell, 2012/2; Esperanto, 2012/4; Femina, 2012/29; Heroldo de Esperanto, 2011/11, 2012/3; Informilo por Interlingvistoj, 2012/2; La Brita Esperantisto, 2012/972; La Lanterno Azia, 2012/3,4; La Ondo de Esperanto, 2012/5; La Revuo Orienta, 2012/3,4; Literatura Foiro, 2012/255; Norvega Esperantisto, 2012/2; REGo, 2012/2; Scienco kaj Kulturo, 2012/1; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2012/1.

Literatura Foiro, 2012, №255

Post uvertura poemo de Alberto García Orive pri 2012, ankaŭ la prezidanto de LF-koop, Marc Hiltbrand, bondeziras al la legantoj de *Literatura Foiro* okaze de la nova jarkolekto, la 43a de la plej longe ekzistanta kultura revuo en nia lingvo.

En la februara numero nian originalan literaturon primicas per ĉapitro el la lauda eldonota romano *La homo kiu ne sukcesis trompi sin mem* de Armando Zecchin, per rakontoj de Massimo Acciai kaj Julian Modest, per poemoj de Lenke Szász.

La teatra salono bisas tri fojojn: dum *Varma lineo* de Giorgio Silfer antaŭ-premieras, premieras alia teatraĵo de la Flurluda Majstro, *La butiketo de la juvelisto*. Kaj kun László Rádacsy aktuale pri la teatra vivo en Budapeŝto.

En la rubrikaj pri mondliteraturo: la konstanta sekretario de la Sveda Akademio Peter Englund salutas la literaturan Nobel-premiiton Tomas Tranströmer (en traduko de Bertil Nilsson). Carlo Minnaja omaĝas al Enrico Dondi, la antaŭ nelonge forpasinta elstara tradukinto de la itala klasika literaturo en nian lingvon. Ankaŭ la rakonto *Akvo efemera* de Heloisa Seixas (en traduko de Aloisio Sartorato).

Muziko: Daniel Mrázek prezentas la novan kompaktan diskon *Duope* de Kajto, Mariana Evlogieva recenzas la duan volumon de *HipHopa Kompilo*. Kino (kaj ne nur): kiam Charles Chaplin komencis ami sin mem — lia konfeso per la traduko de Donald Broadribb.

Celso Martins rememore pri Tibor Sekelj. Bibliografio: la publikaĵoj en LF de la iama redakciano Dimitar Haĝiev.

En la antaŭa numero 254 oni povis legi pri la fenomeno ke bibliaj rakontoj estas interpreteblaj en multaj malsamaj manieroj, kaj en la nuna LF Leif Nordenstorm kiel ekzemplon elektis tiun pri Noa en Genezo 6-9.

HeKo

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la aprila Sudoku venis dek respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Marc Vanden Bempt (Belgio), Edmund Grimley Evans


| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 2 | 9 | 6 | 1 | 3 | 4 | 5 | 8 | 7 |
| 1 | 7 | 3 | 8 | 2 | 5 | 4 | 6 | 9 |
| 8 | 5 | 4 | 7 | 6 | 9 | 2 | 1 | 3 |
| 3 | 6 | 8 | 4 | 7 | 2 | 9 | 5 | 1 |
| 5 | 4 | 9 | 3 | 1 | 8 | 7 | 2 | 6 |
| 7 | 2 | 1 | 5 | 9 | 6 | 8 | 3 | 4 |
| 6 | 1 | 5 | 2 | 4 | 7 | 3 | 9 | 8 |
| 9 | 8 | 7 | 6 | 5 | 3 | 1 | 4 | 2 |
| 4 | 3 | 2 | 9 | 8 | 1 | 6 | 7 | 5 |

(Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Edeltraut Henning (Germanio), Gianfranco Vignando (Italio), Zbigniew Tykowski (Pollando), Svetlana Konjašova, Vladimir Vyčegjanin (Ruslando), Jovan Nikolić (Serbio).

La solvo estas ĉi-apude.

La libropremion loto donis al **Edeltraut Henning**, al kiu ni sendas la libron kaj niajn gratulojn.

Diagonaloj



Maldekstren malsupren: 2. Pli ol necese; 3. “Simfonio” de agrablaj odoroj; 4. Longa monaĥa robo; 5. Malinde pretendi pri iuj privilegioj; malŝate kondukti kontraŭ aliaj; 6. Japana “Venecio”; 7. Scienco pri moralo; 8. Vento, kiu aperas sur marbordoj; 9. Granda malprofunda telero; 10. Kapvesto de la papo; 11. Ricevi impreson; 13. Ĝenro en lirika poezio kaj muziko.

Dekstren malsupren: 1. Interteksti per oro, arĝento kaj silko sur ŝtofo; 2. La unua dono de Orfiŝo en la fabelo de Puŝkin; 3. Samtempa movo de reĝo kaj turo en ŝako; 4. Vira ceremonia vesto; 5. Kunsido de kriminala tribunalo; 6. Stepa, loksida, nomada, sed ne migranta birdo el la familio gruiformaj. Ĝi bone kuras, sed malbone flugas; 7. Malĝuste opinii; 8. Insekto, kiu ofte vivas en kuirejoj, bakejoj kaj ŝipoj; 9. Malnova mezurunuo por likvoj. Okono de galjono; 10. Ĉinoj opinias, ke por viro necesas sep aĵoj: hejtligno, oleo, ..., sojo, vinagro, zizo kaj salo; 12. Germana fizikisto, kiu malkovris leĝon de kunligo inter kurento, tensio kaj rezisto.

Viaj respondoj venu al la redakcio rete aŭ poŝte antaŭ la 10 de septembro 2012.

Kompilis **Viktor Alikin**

Falsaj ĝemeloj



Pluraj legantoj de la papera *Ondo* sentis ŝokon, vidante en la maja *Ondo* la foton de Oscar Wilde, kiu garnas la jubilean artikolon de Grigorij Arosev pri la rusa poeto Igorj Severjanin. La eraron kaŭzis mia tro naiva fido al la serĉilo de Guglo, kiu proponis foton de Oscar Wilde (vidu dekstre) kiel tiun de Igorj Severjanin.

Estas kurioze, ke Igorj Severjanin (vidu maldekstre) efektive ofte imitis antaŭ publiko la aspekton kaj la pozojn de Wilde kaj kredis sin simila al li. Ĉu vere simila? Juĝu mem... Mi petas pardonon pro mia senintenca fuŝo. Skoldu min! Riproĉu Guglon. Sed ne la senkulpan artikolinton. Kaj ne la jubileantan Reĝon de Poetoj.



AIKO

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ne boris kortobirdon

Li neniam kokodrilis kun mi. (Dieter Rooke pri la forpasinto Carlo Nicolodi, *La Internaciisto*, 2011, №4; rimarkis Richard Schneller)

Sportema pedagogo

En la lernejo ... mi instruas Esperanton kadre de ekstera lecionaro... (Reza Kheirkakh, 19 okt 2011, yahoo-grupo landa-agado, mesaĝo 16314)

Emfaza konsento

La komitatanoj ... per pasiva rilato [ne partoprenante aktive la konsulton — pore aŭ kontraŭe] emfazis sian akcepton por la estrara dokumento. (Barbara Pietrzak, 4 apr 2011, yahoo-grupo komitato-de-uea, mesaĝo 6415)

Centra Dom' en Roterdom'

... Flory Witdoeck kantis la himnon dum la malferma tago de UEA en Roterdomo. (Zlatko Tišljar, *Eŭropa Bulteno*, aprilo 2012, p. 10)

Ĉu aŭskulto? ĉu deŝuto? La unua, sen diskuto

“Bela revo” estas la esperanto-kanzono plej aŭskultata en Youtube, per pli ol 20.000 deŝutoj fine de aprilo 2012. (*Anjo Amika la plej aŭskultata en Youtube* // HeKo 505 6-B, 2 maj 2012, esperantio.net/index.php?id=1930)

Sub stelo ridiga

... en Malago, Andaluzio ... la 13an-14an [de oktobro 2012] disvolviĝos la unua Astrologia Semajnfino en esperanto ... la unua kultura iniciato gastigota en la nova Esperanto-Domo ... Eblas aliĝi al la astrologia diskutlisto ankaŭ per mesaĝo al nia redakcio. (*En oktobro nova Esperanto-Domo ekfunkcios* // HeKo 500 9-B, 10 mar 2012, esperantio.net/index.php?id=1887)

La danĝera scio, aŭ: Kiel subfosi la socion

Mi plenumas devon kontraŭ la socio per tio ke mi dividas mian scion kun ili. Mi ebligas al homoj el la socio ekscii pli multe pri Esperanto... (Lu Wunsch-Rolshoven, 5 jul 2008, *Ĉu fondi novan asocion aŭ ĉagreniĝi pro la malnovaj?* liberafolio.org/2008/klausesperanto/#1215210410)

$$i\hbar\frac{\partial}{\partial t}\Psi(\mathbf{r},t) = -\frac{\hbar^2}{2m}\nabla^2\Psi(\mathbf{r},t) + V(\mathbf{r},t)\Psi(\mathbf{r},t)$$

Oni diskutis kaj analizis la kvanton de estraranoj. (Mario Ruiz Karell. *Unua komitatokunsido — aliaj aspektoj* // *Havana Karavano*, 2010, №3)

Ankoraŭ ne pereis

Etonteco de Pollando (Rubriktitolo, polskieradio. pl/eo/dokument.aspx?id=119723, 10.11.2009)

Plukis **István Ertl**

La redakcio de La Ondo deziras al ĉiuj legantoj Agrablan Kongresan Sezonon!

ARKONES denove invitas

La 28aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto ARKONES okazos en Poznań (Pollando) ekde la 21a ĝis la 23a de septembro 2012. La programo tradicie konsistas el tri branĉoj, el kiuj la unua inkluzivos artajn kaj kulturajn programerojn, la dua – prelegojn kaj klerigajn programerojn, kaj la tria – programerojn ligitajn kun la Esperanto-movado kaj ĝiaj pasintaj kaj aktualaj defioj.

ARKONES estas tute aparta kaj karakteriza aranĝo, kiu de unu flanko inkluzivigas sciencajn prelegojn (ĝi okazas tuj post la sesio de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM) kaj seriozajn primovadajn diskutojn, kaj de la alia prezentas abundecon de la Esperanto-kulturo en ĝiaj pluraj aspektoj. Krome, dum la vendreda kaj sabata vesperoj oni invitos partoprenantojn distriĝi per kaj por Esperanto. Bonaj koncertoj kaj agrabla etoso ne malhelpos.

Ĉi-jare ni denove emfazos nian specialan zorgon pri gejunuloj: membroj de la Pola Esperanto-Junularo partoprenos senpage, kondiĉe de aliĝo antaŭ la 15a de septembro. Aliaj junuloj ĝuos rabaton. Kaj ne forgesu, ke **ARKONES** okazas sub aŭspicioj de TEJO!

Ni ŝanĝis la loĝigan oferton. Anstataŭ mendi loĝadon en studenta domo, oni povos rezervi liton en pli proksima kaj tute ĉarma junulargastejo. Ĝi estos tute je nia dispono kaj — kreu min — ĝia karaktero bone akordiĝos kun la etoso de nia festivalo.

Poznań estas facile atingebla aviadile, trajne kaj aŭte. Antaŭ ol vi preparos valizojn kaj varbos amikojn, vizitu nian retpaĝon www.arkones.org kaj plenigu la aliĝilon.

✉ Paweł Janowczyk, ul. Bielska 13A, PL-61-435 Poznań, Pollando

☎ +48 (61) 875-58-79

✉ janowczykpawel@poczta.onet.pl

✉ tobiasz@esenco.org

Tobiasz Kaźmierski



Israelo. De ok jaroj Esperanto-Ligo en Israelo estas inter pli ol cent institucioj, kiuj metas florkronon en la publika memorceremonio okaze de la holokaŭsta tago en Yad Vashem en Jerusalemo. Ĉi-jare metis la florkronon nome de ELI kaj UEA Malka Zemeli, Jehuda Miklaf kaj Amri Wandel. (*Amri Wandel*)




Togolando. Esperantistoj aktive partoprenis la kulturalan semajnon en la universitato de Lomeo, la ĉefurbo de Togolando. Ili informis pri la Internacia Lingvo, disdonis centojn da flugfolioj, kaj registris pli ol kvindek adresojn de tiuj, kiuj konsentis esti rekontaktitaj por eventuala kurso. (*Afrika Komisiono de UEA*)



Esperanto-urbo. ICH sponsoris unu el la benkoj, kiujn la loka klubo de migrantoj starigis en kaj ĉirkaŭ la urbo Herzberg apud belaj kamparaj kaj arbaraj vojoj kaj padoj. Sur la dorsapogilo de la lignobenko estas gravurita per bone videblaj literoj: “Esperanto-benکو,” kaj en angulo la dato: “Marto 2012”. (ICH)




Fjodor Dostojevskij.
Blankaj noktoj: Ses prozaĵoj.
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.
Ĉeriza ĝardeno: Noveloj, dramoj.
352 paĝoj, € 27,0.



Rusa Novelaro. Volumo 1
La 19a Jarcento.
400 paĝoj, € 30,0.




Samideanoj: Satiroj kaj humuraĵoj
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.
Amiko el la junaĝo de Maigret.
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.
Diverskoloro: Originalaj prozaĵoj.
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.
Historio de Esperanto.
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof
Mi estas homo.
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.
En la serĉado de la mondlingvo.
160 paĝoj, € 15,0.